

Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503 dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana



Shoqata Esperantiste Shqiptare është e njohur ligjërisht sipas vendimit nr 3503 datë 15/02/2013 të Gjykatës së Tiranës

Retpaĝo- Faqja në internet: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> aŭ www.esperanto.net/al

Diskutlisto- lista e diskutimit në internet: albanajesperantistoj@yahoo.com

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO - INSTITUTO

Buletini i Institutit Shqiptar të Esperantos

Nr. 129, februaro- shkurt 2017

Niaj albanaj proverboj - Proverbat tona shqiptare

Dielli, edhe kur ka re, ndrit. - La suno brilas eĉ kiam nebulas

Difton fmija, ĉ'ka shtëpia. - La infanoj malkaŝas tion, kion la hejmo enhavas

Dita pa punë nata pa gjumë. - La senlabora tago similas al la sendorma nokto

Dora me baltë buka me mjaltë. - La kotigita mano tutsamas al la mieligita pano

(Ĉerpitaj el la Albana Folkloro)

Aldone

- Penu agi por la bono, dum vi disponas tempon.

- Estas danĝere havi la kapon ĉiam plena de revoj, sed la manojn senokupaj

(ĉerpitaj de Editoro Lorenz)

La Enhavo

Ni kaj UEA, ILEI, AIS

Radio Kosova pri Esperanto

Honorigo

Mireille Grossjan raportas pri si mem kaj pri ILEI agado

Ni bonvenigas

Beletra konkurso en Bjalistok

Esperantisto de la jaro

Infanadoleska kongreseto en Seulo

Ni rememoras

Informaĵoj

Novaĵoj el Latinameriko

La gelernantoj de Sebuhor

Premiitoj de edukado.net

Vortbeleco en Esperanto

Internacia virina tago

Niaj leteroj

El Svisio, el Italio, el Serbio, el Afriko, el Lituanio, el Grekio, el Francio, el Brazilo, el Ĉeĥio, el Slovakio

Artikoloj

Fabrizio A. Pennacchietti, lingvistiko

Antaŭvidoj de profesoro Hawking

Paiva Netto: Konstanta Kristnasko kaj tutmonda renovigo

Albert SCHWEITZER (1875 – 1965)

Albin Kurti, la dividita Mitrovico

Afiŝo

Nia propagando

Mi lavis la barbon de Zamenhof

Zamenhof Tago

Nova parlamenta grupo en Pollando

DONACO POR KRISTNASKO: MESIO DE HÄNDEL – EN ESPERANTO

Esperanto- revuoj

Albanio en la esperanto-revuoj

Esperanto en bildoj

Frazoj, prepozicioj, gramatiko

Beletraĵoj:

Sali Bashota: poeziaĵoj

Adil Olluri: la reveno de la patro

Julia Sigmond: la decembra letero

Humoraĵoj

Anekdotoj el la revuo FREŜO ka

Vojaĝoj

Fotoj de brazila samideano

Fotoj de sudkoreaj samideanoj

Fotoj el Albanio kaj Kosovo

Ni kaj UEA, ILEI, AIS

- Radio Kosova parolas pri Esperanto
Ka 22-an de decembro, en la matena elsendo de 8-a horo Radio Kosova intervjuis la verkiston Adil Olluri kies rakonto " Letero de fremda soldato " gajnis premion en internacia konkurso organizita de Bjalistokaj esperantistoj antaŭ nelonge. Ĉi kaze la ĵurnalistino Meriban Dushi telefonintervjuis ankaŭ s-ron Bardhyl Selimi, el Tirana kaj petis lin paroli iomete pri Esperanto movado. Bardhyl klarigis interalie ke pluraj Kosovaj verkistoj estas jam tradukitaj al Esperanto, nome Ali Podrimja, Eqrem Basha, Flora Brovina, Adem Demaçi, Agim Vinca, Adil Olluri.
Nehat Sokoli
-

- Honorigoj fare de FORUMO

Tiun geston de honorigo ni jam faras de pluraj jaroj. Danke al tio kun la ĉi-jaraj premioj estos 99 vivaj kolegoj kune kun 97 jam forpasintaj gravuloj.

Niaj pensoj kaj koraj gratuloj iru al la festataj. Ni dankas ĉies sindonan laboron kaj deziras al ili longan vivon en sano kaj energio kaj multajn pliajn eblojn por kontribui al nia komuna laboro.

La unuopajn vivresumojn vi povas vidi klakante al la nomoj kaj sub la prezentoj vi povas lasi viajn gratulvortojn kaj memoraĵojn pri la kolegoj.

GRATULOJN al

- [Suzanne BOUROT](#) el Francio
- [Michel DECHY](#) el Francio
- [Roman Dobrzyński](#) el Pollando
- [Emilia Guadalupe Vega](#) el Meksiko
- [Natalia KASYMOVA](#) el Rusio
- [Jolanta Aldona KIERES](#) el Pollando
- [Aranka LASLO](#) el Serbio
- [Mallely Martínez Mateos](#) el Meksiko
- [Fabrizio Angelo Pennacchetti](#) el Italio
- [Nina Pietuchowska](#) el Pollando

- [Arlette Plutniak](#) el Francio
- [Edmond Plutniak](#) el Francio
- [Llibert Puig](#) el Katalunio
- [Peter Weide](#) el Germanio
- [Wei Yubin](#) el Ĉinio

Por la sekvajaro vi povas sendi proponojn ĉe la [FORUMO](#).

- **Grosjean Mireille**



2016

Mireille rakontas al vi pri ĉi tiu jhus finita jaro per kelkaj ekzotaj koloroj...

Se vi volas **vidi** la lokojn, kiujn mi vizitis, vi povas, irante al mia blogo mirejo3.blogspot.com.

Unue: Mi esperas ke vi fartas bone, ke vi komencis 2017 kun impeto kaj kuraĝo. « Chion bonan » mi deziras al vi, kiel ni diras en la germana " Alles Gute " Mi elkore dankas ĉiujn, kiuj sendis al mi siajn novaĵojn kaj bondezirojn.

Mi komencis 2016 en mia vilaĝo Les Brenets, Svislando. De 18 ĝis 21 januaro mi saltis al Orléans, Francio, por prelegi pri la dominantaj lingvoj kaj mondaj lingvoj, inkluzive de Esperanto (EO) . De marto 11 ĝis 14 mi estis en Herzberg « die Esperanto-Stadt », la Esperanto-Urbo, en Germanio.

Fine de marto: privata restado ĉe miaj geamikoj Ansen en Istanbul, Turkio, poste partopreno en EO-kongreso en Kayseri, centra Turkio, kaj poste salto al Erevano en Armenio. Mirindaj malkovroj. (Mi prelegos pri Armenio en Le Locle la 25-an januaro 2017) .

5 ĝis 8 majo: parto de la Estraro de la Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) restadis ĉe mi hejme por laborkunsido. Tiuj el Azio, Afriko kaj Ameriko partopreni per skajpo.

Junio 2 al 5 en Nantes, Francio, kaj de tie salto al St Petersburgo, Rusio, de tie per ŝipo al Helsinko, Finnlando, lando, kie mi ankoraŭ neniam estis.

Julio: du kongresoj de po unu semajno : Nitra en Slovakio kaj Nyíregyháza en Hungario.

Aŭgusto 28: per helpo de tri viroj de la vilagho mia piano iras en nian trajneton kaj ek kun muziko : *Boogie-woogie* sur la trajnlinio « Le Regional » !

Septembro kaj oktobro 3 semajnoj en Kotonuo, Benino.

Novembro: Ĉinio (Guangzhou kaj Zaozhuang) 10 tagojn, Nepalo (Katmanduo) 17 tagojn, kaj Nederlando (Roterdamo) 3 tagoj. En Katmanduo mi povis partopreni en la geedziĝfestoj de Prakash, la juna nepalano, kiu " adoptis " min kiel avinon. Estis la 20an de novembro. Tri tagojn poste li eksciis, ke li estis maldungita. Ni estas en grandaj zorgoj pri lia estonteco.

Decembro 15: salto al Yverdon por vidi mian trian jhus naskitan nepon kaj gratuli la feliĉajn gepatrojn Joelle kaj Julien. En la familio de Marion : Romain studas arkitekturon ĉe la Politeknika Altlernejo en Lausanne (EPFL) kaj Samuel daŭrigas sian lernejan vojon; li estas pli alta ol mi....

Mi finis 2016 en Saarbrücken en Germanio, partoprenante la renkonton de Esperanto-parolantaj familioj « Novjara Renkontiĝo ».

Mi ankau iom saltetis tra Svislando : tio estas al Winterthur (ZH) , Morges (VD) , Uster (ZH) Hulftegg (SG) Hirzel (ZH) , Vevey (VD) , Flawil (SG) . Kaj dufoje en Berno por akiri rusan vizon kaj ĉinan vizon.

Amikoj sukcesas veni al mia hejmo por restadi kun mi inter miaj vojaĝoj : Duncan kaj Cecily el Usono, Waro kaj shia filo el Tajvano, Ao el Japanio, Prakash el Nepalo kaj certe mi forgesas kelkajn...

En mia vilaĝo mi membras en la Ĝenerala Konsilio (Parlamento) kaj prezidas ghin de aŭgusto 2016 ĝis junio 2017. Mi preparas akcepton unufoje monate en kunlaborado kun « Pro Senectute »: mi bonvenigas emeritulojn por manĝo tagmeze.

Mi lanĉis Lingvo-Kafejon en La Chaŭ-de-Fonds, ĝi funkcias bone, mi havas grandan plezuron vidante la generaciomikson. Imagu la rusan tablon kun 8 personoj, juna patrino, kiu estas la gvidanto, kaj aliaj, inkluzive de maljunaj sinjorinoj, kiuj venadas por havi la plezuron paroli ruse dum vespero.

La gvidado de la Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okupas min multe kaj mi ŝatas tion ankaŭ. Mi ne povas plendi, ĉar mi kandidatighis por esti prezidanto kaj mi elektiĝis. Do " selber Schuld " ni dirus en la germana ; en Eo: mi mem kulpas pri tio. Mi proponis Esperanton kiel nematerian kulturen heredaĵon de Svislando en la kantono Neŭŝatelo. Sukcesa paŝo: la propono iris de la kantono Neŭŝatelo al Berno. Mi atendas la rezulton. Edmond Privat kaj Hector Hodler meritas tion.

Mia sano estas stabila. Neniu doloro. Kelkajn medikamentojn mi devas gluti. Mi havas specialan

dieton. Mia pezo estas tro alta, sed mankas tempo por koncentriĝi pri maldikigho... Mi prenis tempon kaj mi daŭre faras tion por bone komuniki kun miaj filinoj, kiuj estas tiel gravaj en mia vivo, bonvena subteno en ĉiuj momentoj. Kaj mi esperas, ke tio estas reciproka.

Mi sendas al vi miajn plej elkorajn salutojn.

Mireille

Les Brenets 2017-01-03

- **ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro pri trimonata agado, de 2016-10-15 ĝis 2017-01-15.

Eventoj

Pasintaj tri monatoj estis plenaj je diversaj eventoj.

Novembre venis konfirmo, ke okazos sesio de **ILEI UEA ekzamenoj** okaze de la sesa Afrika Kongreso de Eo en Bunda, Tanzanio, jarfine. Tio estis konsentite kun Internacia Ekzamena Komisiono (IEK).

Kadre de la **Jaro de la Lernanto (JdL)** ILEI lanĉis novan agadon: **Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro, la 15-an de decembro**. La Prezidanto Mireille Grosjean alvokis ĉiujn esperantistojn per la kutimaj informkanaloj legi en tiu tago la saman tekston. Por Komuna Legado-2016 estis proponita la poemo de Tibor SEKELJ " Je kies nomo? ", kiu rilatas al la nuna monda situacio militoplena. Fine de novembro en Facebook la Prezidanto kreis grupon pri tiu agado:<https://www.facebook.com/ILEI-Komuna-Legado-okaze-de-la-Tago-de-la-Libro-1791351147787608/?fref=ts>

La diversaj vojaĝoj de la Prezidanto (vidu sube) okazis ankaŭ kadre de la **Jaro de la Lernanto (JdL)** : Ĉinio en du malsamaj lokoj, Nederlando, Germanio.

Dum la vizito de la Prezidanto en Katmanduo, **Nepalo**, okazis interesa kaj vigla diskuto inter ŝi kaj NESPA-anoj pri la planoj por nepala EO-movado, inkluzive EO-instruadon. NESPA = Nepala Esperanto Asocio.

En Timișoara, **Rumanio**, la 11-12-an de novembro 2016 okazis Internacia Scienca Esperantorumana Kolokvo kun la temo " *Esperanto - ponto inter lingvoj kaj kulturoj* ". Ĝin partoprenis estrarano Radojica Petrović. Malĉeesta Mireille Grosjean transdonis prelegon " *Lernhelpa efiko de Esperanto* " (MG) kaj " *Progresita alproprigo de Esperanto per " Perla metodo "* kaj Literaturan atelieron (RP) . Tiu 2-hora ateliero pretas ankaŭ por okazigo en la sama formato kun la samaj aŭ similaj temoj kaj enhavoj dum diversaj aliaj EO-eventoj.

De la 3-a ĝis 6-a de novembro okazis en la ĉina urbo Quanzhou [Ĉĵuanĝoŭ] la **8-a Azia Kongreso de Esperanto** (de KAEM = Komisiono pri Azia EO Movado de UEA) kun la ĉeftemo " Esperanto por la azia kunlaboro en interreta epoko ". Paralele kun ĉi tiu kongreso okazis la **5-a ILEI-Seminario en Orienta Azio** (ISOA) kun la temo " Lerni Esperanton per moderna metodo ". Ambaŭ aranĝojn partoprenis la Prezidanto Mireille Grosjean kaj la

vicprezidanto Xiao-feng GONG " Arko " . Ili prelegis pri Esperanto-instruado en Ĉinio (Arko) kaj pri *Lernado: encerba mirakla procezo* (Grosjean) .

Komence de decembro la Prezidanto nome de ILEI sendis **gratulmesaĝon** al s-ro HORI Yasuo okaze de novembra SUMOO, kiun ILEI aŭspicias kaj kiu havis ĉi-foje mirinde altan partoprenantonombbron.

Meze de decembro la Prezidanto sendis **gratulmesaĝojn**:

1. al la ĉefredaktoro de [edukado.net](http://www.edukado.net) D-ino Katalin Kovats okaze de 15-jariĝo de la paĝaro. Edukado.net kaj ILEI estas partneroj kun iom samaj celoj kaj taskoj kaj la Ligo tre aprezas la laboron de D-ino Katalin Kovats;
2. al VEA = Vjetnama Esperanto Asocio, okaze de ĝia 60-jariĝo, substrekinde la grandan estimon de ILEI al la asocio kaj ĝia sindona kaj valora laboro por Esperanto;
3. al la partoprenintoj de la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto en Tanzanio;
4. al Stefan MacGill, la vicprezidanto de UEA, okaze de lia nomumo kiel la Esperantisto de la Jaro 2016.

JARO DE LA LERNANTO (JdL)

Daŭras la realigado de **JdL**. En IPR 2016/4 estis publikigita la Programo de ILEI por la Jaro de la Lernanto. Ĝi prezentas strategion de la Ligo kadre de tiu iniciato, celojn kaj taskojn de la jam komencinta laboro kaj detalan planon por realigado de JdL. Ankaŭ en la sama numero estis legebla prezento de AGEI, la germana ILEI-sekcio, kiel estis planita en la Programo.

Meze de decembro la Prezidanto kreis skizon de ĝeneralaj dokumentoj pri AMO-LIMA-seminario en Les Brenets, Svislando, kaj Villers-le-Lac, Francio, en majo 2017, 25-an ĝis 28-a.

E-centroj

La prezidanto de ILEI la 8-an de novembro faris fruktodonan viziton en la EO-muzeon en Zaozhuang, Ĉinio. Poste estis ellaborita skizo de kontrakto inter ILEI, UEA kaj la universitato, kiu gastigas tiun muzeon. Tiun agadon ILEI planas realigi kadre de la komuna esploro de UEA-ILEI pri EO-centroj.

Vivo de la Ligo

Oktobre daŭris organizita reta voĉdono por aprobi la protokolon de la komitat-kunsido en Nyíregyháza, Hungario. Kaj fine de oktobro la Komitato de ILEI aprobis ĝin.

Decembre la Estraro diskutis pri novaj Honoraj Membroj de ILEI por proponi ilin al la Komitato dum la 50-a ILEI-kongreso en Busano en 2017, ĉar aŭdiĝas proponoj en diversaj sekcioj.

Konferencoj -> Kongresoj de ILEI

La 50-a (kaj la 1-a samtempe!) ILEI-kongreso en Busano, Koreio.

Novembre estis publikigitaj en la retejo [ilei.info](http://www.ilei.info) la aliĝilo (kun akompanaj statistikaj kaj kontrolaj tabeloj) kaj la kongresa komuniko kun kotiztabeloj, preparitaj de la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović, poste danke al Jozefo Nemeth estis kreita la kongresa paĝo (<http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php>) kaj la nova paĝo <http://www.ilei.info/agado/Busan2017.php>. La nova paĝo servos kiel informfonto kaj dokumentkolektejo de la

50-a Kongreso. Jozefo Nemeth ankaŭ publikigis la bazajn kongresajn informojn ĉe la frontpaĝo de ilei.info.

La anonco estis publikigita ankaŭ ĉe la paĝaro <http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>. Radojica Petrović kreis kaj publikigis retajn komunikojn kaj aliĝilon ĉe Google: https://docs.google.com/document/d/1xnvN-8IoB15LLQoZ0_hsJZzcaWTYVy3ePX9zH0rN7q0/edit?usp=sharing ; https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSe_qbOKp190oU8VwP7cTJwDNUV73eQppfHHjzxU5i13_6CmA/viewform

Ankaŭ nia estrarano pri kongresoj regule plenumas la paĝon de la renovigita grupo " ILEI-kongresoj " en Facebook <https://www.facebook.com/groups/ILEI.Kongresoj/6>, rememorigante pri gravaj eventoj rilate al la kongreso.

Speciale por Ĉinio Radojica Petrović aranĝis retroŝtan aliĝeblon, kun necesaj informoj akompane. Kaj fine de decembro li preparis kongresan informilon/varbilon en tre oportuna kaj bela formato.

En IPR 2016/4 estis publikigitaj la kongresaj komunikoj kaj la aliĝilo por la 50-a kongreso de ILEI en Busano, Koreio, 2017.

La ĉefa loka organizanto daŭre komunikas kun la kongresejo ARPINA por certigo de bonaj kondiĉoj kaj racia uzo de la ejoj. LKK estas en preparado. Novembre-decembre la Estraro kaj la ĉefa lokorganizanto survoĵigis la emblemon por la 50-a ILEI-kongreso. Nenio decidita ĝis nun.

Laŭ la antaŭaj interkonsentoj la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović kunlabore kun la korea sekciestro kaj prezidanto de LKK PARK Yongsung " Nema " planas **kongrespreparan viziton** de R. Petrović al Korea Respubliko fine de februaro kaj komence de marto 2017.

La 14-an de decembro laŭ interkonsento kun la Estraro la Prezidanto skribis al la korea ambasadejo en Berno por peti rendevuon por audi ĝian strategion pri **vizoj** en rilato kun du EO-kongresoj en 2017 en Koreio (UK kaj ILEI-kongreso).

Meze de decembro estis preparita fare de la estrarano pri kongresoj Radojica Petrović artikolo pri Koreio-Busano ILEI-kongreso por la *Revuo Esperanto*.

Decembre Radojica Petrović proponis organizon de **Infana Universitato** enkadre de la kongresa programo, nova formo por la iama ILEI-gimnazio, difinis ĝiajn celojn kaj bazajn principojn kaj kunmetis tekston de ĝia emblemkonkurso. La afero estis diskutita kaj aprobita de la Estraro.

Rezulte: ĝis la jarfino de 2016 aliĝis 48 kongresanoj el 11 landoj, multe pli ol iam ajn en la historio de ILEI konsiderante tiun antaŭkongresan periodon. Grandan kontribuon kaj instigon al la aliĝado donis koleginoj GONG Xiaofeng - Arko kaj SHI Xueqin - Neĝeta kun 37 aliĝintoj el Ĉinio.

Venontaj Kongresoj

Daŭras la esploro pri la taŭga loko por la ILEI-kongreso en 2018. La estrarano pri kongresoj Radojica Petrović estas en konstantaj kontaktoj tiusence. Ĉar UK okazos en Lisbono, Portugalio, niaj rigardoj iras al la ibera duoninsulo.

Komisionoj, sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj

Fine de decembro la Prezidanto sendis alvokon al la sekciestroj kaj reprezentantoj pri jara raporto bezonata de ILEI kaj liverenda de ĉiuj sekcioj, pri ilia agado, inkluzive la instruadon de E-o; pri partopreno en diversaj projektoj kaj iniciatoj de la Ligo.

Venis jarraporto de la sekciestro pri la agado nur! el Finnlando.

Decembre aŭspicie de la pola sekcio de ILEI en la Centro de Interkultura Edukado en Vroclavo, **Pollando**, kunlabore kun la neesperantista organizajho " *HORIZONTO* " okazis la Festivalo de Deklamata Poezio kaj la Konkurso de laŭta legado sub la komuna titolo " Vortbeleco en Esperanto " .

Grandega laboro estis farita en **Ĉinio** dum du imponaj internaciaj EO-aranĝoj: la 8-a Azia Kongreso de Esperanto en la urbo Quanzhou (03. 11-06. 11. 2016) kaj kadre de ĝi la 5-a ILEI-seminario en Orienta Azio (ISOA) . La ĉeforganizanto de ISOA estis la vicprezidanto de ILEI Xiao-feng GONG (Arko) . Danke al ŝia laboro okazis entute 8 prelegoj kaj 2 demonstraj kursoj kaj ĉiufoje la kunvenejo estis plenplena de partoprenantoj. Decembre Arko organizis 4-sesian ret-trejnadon pri voĉlegado, ĉiusesie 10 kursanoj partoprenis. Daŭris tiu sesio 10 tagojn, kursanoj liveris sian voĉlegadon ĉiutage kaj la ĉefparolisto s-ro ZHAO Jianping gvidis kaj komentariis la voĉlegadon.

Danke al la klopodoj de la vicprezidanto aliĝis 14 novaj membroj al ILEI kaj pli ol 30 partoprenantoj por ILEI-kongreso en 2017. Legeblas ampleksa prezento de la ĉina sekcio de ILEI en IPR 2016/3. Gratulojn kaj dankojn al Arko!

Pere de la klopodoj de la reprezentantino de ILEI en Rusio Svetlana Smetanina decembre organiziĝis rusia karavano al la ILEI-kongreso al Busano konsiste je 14 homoj.

Estraro

La Prezidanto aktive preparas **AMO LIMA** –seminarion en Les Brenets, Svislando, de la 25-a ĝis la 28-a de majo 2017.

En 2017 en Serbio okazos la 39-a **REF** Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj kun aŭspicio de ILEI. La Estraro pridiskutis la eblan kontribuon de la Ligo al REF, kiun ĝi aŭspicias en 2017 – per observoj kaj analizoj de diversaj lingvouzaj kaj interkulturaj aspektoj inter la denaskuloj. El la ĉeforganizantoj de tiu renkontiĝo estas la estrarano Radojica Petrović. Atendeblas proksimume 20 familioj kun entute 70 partoprenantoj. Ĉu scienca observado de tia renkontiĝo eblus, neniu ankoraŭ scias; estas dezirinda paŝo.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

Fine de oktobro la Estraro kolektis planon por IPR rilate al la **Jaro JdL**.

La revuo suferis paneeton en oktobro kaj novembro 2016. La kaŭzo estas la translokiĝo de la domo de Flandra Esperanto Ligo (FEL) , kiu prizorgas la presadon kaj sendadon. La Estraro ricevis informon, ke FEL sendis IPR 2016 3 kaj 2016 4 kune, tio estas, ke tiuj du numeroj atingis ricevantojn nur komence de januaro. Estas dediĉitaj granda tempo kaj atento al eldonado de valora enhavo.

Juna Amiko (JA)

En aktiva preparo estas la jubilea numero 150. La redaktoro Stano Marček kaj la skipo sindone laboras, por ke la festa numero estu riĉenhava, bela kaj memora.

ILEI en la Reto kaj en gazetoj

La Prezidanto Mireille Grosjean daŭre plenigas la kreitan grupon en la Facebook-paĝaro «ILEI labortable - ILEI desktop», publikigante tie novaĵojn pri **JdL, Busano** – la loko de la **50-a ILEI-kongreso**, alvokojn, fotojn pri la aktualaj okazaĵoj ene de la Ligo.

La estrarano pri kongresoj Radojica Petrović same aktive disvastigas tra diversaj Interret-servoj kaj kanaloj informon pri la **ILEI-kongreso en Busano**.

En Facebook estis kreita paĝo por la noviniciata projekto de ILEI: " Unu leciono pri EO por ĉiu lerneĵano " .

Danke al Germain Pirlot, Belgio, aperis artikolo pri ILEI en la " Inform-Bulteno " de AEDE – Eŭropa Asocio de la Instruistoj (Association Européenne Des Enseignants) .

Kunlaboro kun UEA

Oktobre la Estraro proponis al la Estraro de UEA pripensi rabatojn pri kongreskotizoj por tiuj, kiuj aliĝos al ambaŭ kongresoj – UEA kaj ILEI. Tio povus pliigi la partoprenontojn de ambaŭ aranĝoj.

La Estraroj de UEA publikigis alvokon al la Komuna Legado en " Estraro Komunikas " EKO - 33 novembre.

Ankaŭ EKO publikigis ĉiujn novajn anoncojn, alvokojn pri la ILEI-kongreso en Busano en 2017. La Prezidanto de ILEI preparis raporton pri sia esplor-vizito al la universitato kaj muzeo de Zaozhuang, Ĉinio por la *Revuo ESPERANTO* (RE) .

La 26-an de novembro okazis la **Malferma Tago en la CO de UEA en Roterdamo** kun la ĉeftemo " **Jaro de la Lernanto** " . La Prezidanto Mireille Grosjean prelegis pri " **ILEI interkreskoj, puŝoj kaj ŝanĝoj: defiplena krozado** " . Temis pri reeldono de *Manlibro* kadre de JdL, pri rilatoj de ILEI kun UNESKO, pri la okazigo de la AMO-LIMA-seminario la 25-28-an de majo en Les Brenets, Svislando, pri la Komuna Legado.

La 27-an de novembro en CO de UEA okazis **Seminario pri informado**. Chuck Smith, Mireille Grosjean kaj Veronika Poór gvidis ĝin por enprofundiĝi en la plej efikajn manierojn informi pri Esperanto kaj en la diversajn aspektojn de tiu agado; por adekvate gvidi la homojn de scivolemo pri Esperanto al aktiva partopreno en la Esperanta komunumo. Partoprenis dudeko da personoj.

Kun TEJO

Decembre ILEI diskonigis tra siaj kanaloj demandaron de la teamo de **Pasporta Servo**.

Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj

Fine de oktobro la Prezidanto Mireille Grosjean denove ekrilatis kun **UNESKO**; reago: la respondo al la kandidatiĝo de ILEI venos post monatoj.

Dum sia restado en Ĉinio la Prezidanto de ILEI vizitis esplorcele la universitaton kaj muzeon en la urbo **Zaozhuang**. Fruktondonaj traktadoj koncernis diversajn temojn: eblojn de tiu ejo

(spacajn, teknikajn k. a.) por E-o; la staton de la ĉina kaj azia ĝenerale EO-movado; pri strategio por kunlaboro inter tiuj muzeo – universitato – UEA – ILEI kaj perspektivoj rilate al tio por la evoluigo de la azia kaj la monda EO-movado. Rezulto de tiu vizito povus esti kontrakto inter ILEI - UEA kaj la muzeo pri kunlaboro.

Mireille Grosjean kiel kun-prezidanto de la Svisa EO-Societo proponis EO-n kiel svisan **kulturan nematerian heredaĵon** al sia kantono Neuchâtel. La kantono aprobis la proponon kaj sendis ĝin al la svisa registaro.

Kontaktoj kun enmovadaj institucioj kaj aktivuloj

Okaze de Novjara Renkontiĝo (NR) en Germanio la Prezidanto kunsidis kun Lu von Rolshoven kaj Cyrille Hurstel, du altnivelaj profesiaj respondeculoj pri eksteraj rilatoj. Plie estis Valère Doumont kaj Didier Janot. Ili planis strategion por la novinciata projekto " **Unu leciono pri EO por ĉiu lerneĵano** ". La laboro survojas. Poste estis kreita listo de alparolendaj instancoj por aktivuloj en ĉiuj landoj. La Prezidanto ellaboris la 14-partan enhavon de tiu modela leciono kaj verkis modelon de la letero al tiuj instancoj.

Fine de decembro la Prezidanto sendis jarfinan komunikon. En ĝi ŝi indikis gravajn agadpunktojn de la Ligo en 2017 kiel alvokon al ĉiuj sekcioj kaj individuaj membroj de ILEI.

Dankoj


Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo ricevu elkorajn dankojn.

Vicsekretario de ILEI: Elena Nadikova Prezidanto de ILEI: Mireille Grosjean 2017-01-15

- **Ni bonvenigas**
Brazilan samideano viziton Albanion junio 2017



- Johan Derks prelegos en Tirana marte 2017



Estas jam interkonsentite kun la altlernejo Wisdom en Tirane por bonvenigi s-ron Johan Derks kaj sian edzinon Svetlana por prelegi tie. La temo estos " Elmigrinta krizo en Eŭropo kaj ties solvo ". Ĉi kaze la esperantista geparo vizitos Tirana-n kaj renkontiĝos kun ĉi tieaj esperantistoj.

- Rezultoj de la Literatura Konkurso 2016



Informo pri la rezultoj de la literatura konkurso „Elmigrintoj: mi, vi, li... ” anoncita de Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki kaj Bjalistoka Esperanto-Societo en la jaro 2016.

En la datlimo anoncita en la konkursa regularo la organizantoj ricevis 16 verkojn:

- 9 verkoj el Pollando
- 2 verkoj el Albanio
- 1 verko el Hispanio
- 1 verko el Nepalo
- 2 verkoj el Germanio
- 1 verko el Britio

La komisiono decidis enmanigi krompremiojn al:

1. Wojciech Bardzik por la verko : " Elmigrintoj "
2. Ewa Siurawska por la verko: " Ĉu eblas esti feliĉa emigrulo? "
3. Joanna Sokalska por la verko: " Sankta vespero hejme "
4. Bardyl Selimi por la verko : " Grandaj albanaj eksodoj "
5. Adil Olluri por la verko: " La letero de fremda soldato "
6. Gerharda Webera por la verko: " Ekstereŭropaj fuĝintoj en la Eŭropa Unio "

La komisiono decidis premii laŭ la regularo:

1. Sandip Lamichhane por la verko: " Kial nepalaj viroj iras labori arabajn landojn "
2. Johann Andreas Pachter por la verko: " Elmigro de A al B de Alpoj al Berlino "
3. Waclaw Rekowski por la verko: " Elmigrintoj: mi, vi, li... "
4. Małgorzata Dobkowska por la verko: " Perversoj "
5. Grażyna Barszczewska-Banel por la verko: " La longa migrado "
6. Ina Łapińska por la verko: " Oni elektas nek la patrujon nek la gepatrojn "
7. Helena Burchardt por la verko: " Elmigrintoj: mi, vi, li... "
8. Suso Moinhos por la verko: " La fenomeno migrado en la esperanta literaturo "
9. Elżbieta Karczewska por la verko: " Amo de mia vivo "
10. Jens Spillner por la verko: " Elmigrintoj: mi, vi, li... "

La komisiono decidis, ke la plej interesan eseon " Elmigrintoj: mi, vi, li... " verkis Helena Burchardt. Gazeta Wyborcza publikigis ĝin la 9-an de decembro 2016 en sia elektronika versio. Vi povas [legi ĝin ankaŭ sur la ttt-paĝo de Bjalistoka Esperanto-Societo](#). La 10 plej interesajn eseojn vi povas legi en " Bjalistokaj kajeroj n-ro 6 " eldonitaj de Podlaĥia Libraro kaj Bjalistoka Esperanto-Societo.

(Foto de Nina Pietuchowska)

- **Infanadoleska kongreseto**

Gepatroj kiuj partoprenos [UK](#)-on en Seulo, povas veni kune kun siaj GEFILOJ.

Internacia Infankongreseto (IIK) atendas 45 infanojn kaj adoleskantojn de ĉiu aĝo, jam aliĝis [dekkvino](#) el 3 kontinentoj

Songanta pretigis grandan [teamon](#) kaj interesan [programon](#) en taŭga [kongresejo](#). Inter UKejo kaj IIK-ejo regule veturas publikaj busoj.

Kontaktu: infana.kongreseto@gmail.com



En aŭgusto en Francio okazos " **Festa Semajno por Infanoj kaj Familioj** ", kun kursoj kaj aktivaĵoj por ĉiuj.

Bert Ŝuman bert.schumann@gmail.com

Ni rememoras



Kun la karmemora s-ro Vasil Pistoli

Informaĵoj

Novaĵoj el Latinameriko

En la horo de tragedio ne ekzistas rivaloj. Ago de solidareco, respekto kaj abnegacio en momento de tre granda malĝojo montras homajn estulojn konsternatajn, manoj en manoj en la doloro, unuj penantaj apogi la aliajn.

La kolombia futbalteamo Nacia Atletiko diskonigis hodiaŭ (en la 29-a), ke ĝi cedos la titolon de ĉampiono de la Sud-Amerika Pokalo al la teamo Ŝapekoa, viktimo de la plej granda aera akcidento en la historio de la brazila futbalo, okazinta en la frumateno de ĉi tiu dato.

La anonco pri la cedo de la menciita titolo estis farita al la kolombia televidkanalo Teleantiokio, horojn post la tragedio, kiu mortigis pli ol 71 homojn.

La aviadilo, kiu kondukis la teamon Ŝapekuan (kaj ankaŭ ĵurnalistojn), por ke ĝi ludu la unuan partion de la finalo de la konkurado, falis sur areon de arbaro en Kolombio.

Pere de Tvitero, la rivalo de la brazila futbalklubo en la decida matĉo esprimis sian solidarecon.

" Nacia Atletiko profunde bedaŭras, estante solidara kun Ŝapekoa pri la okazaĵo, kaj atendas informojn de la aŭtoritatoj ", deklaris la atletikanoj.

Oficiale, CONMEBOL (SUD-AMERIKA KONFEDERACIO DE FUTBALO), kiu organizadas la turniron, decidis prokrasti plej eble longe ĉiujn decidojn pri la sporta estonteco de tiu konkuro.



Winnie Harlow estas 22-jara kanada supermodelino, kiu famiĝis pro tio, ke ŝi kontraŭas la normojn pri beleco sur la defilejoj. Tiu vestprezentistino havas la vitiligon, malsanon, kiu iĝis multe pli mondkonata pro Michael Jackson.

Ricevinte kvarjaraĝe la diagnozon de la malsano, ŝi diris, ke ŝi suferis ĉikanojn en la lernejo, pro sia haŭto, krom esti rifuzita de modelagentejoj.

" Kiam mi ekfrekventis la lernejon, kaj oni diris al mi, ke mi estas diferenca, tiam mi ekpensis, ke estas io erara ĉe mi. " – ŝi diris al BBC.

Tamen ĉio ŝanĝiĝis, kiam ŝia konto en

Instagramo estis eltrovita de la modelulino Tyra Banks, kiu invitis ŝin partopreni ŝian realecan TV-programon 'America's Next Top Model', en 2014.

Partopreninte en la programo, Winnie estis vokita por esti reklam-knabino de la hispana marko Desigual, kaj ŝia kariero nur eksukcesis de post tio. Ŝi jam partoprenis multe da semajnoj pri internacia modo, krom en la muzikalbuno 'Lemonade', de la kantistino Beyoncé.

La vitiligo estas nekontaĝa malsano, kiu kaŭzas la perdon de la natura pigmento de la haŭto, kiu fariĝas blanka.

" La vitiligo estas parto de mi. Ĝi estas parto de tio, kio mi estas, sed ĝi ne difinas min " – ŝi asertis.



" La idiomio plej malfacila en la mondo estas sendube la pirahaa (la idiomio de la pirahaoj) , - asertis Rolf Theil, profesoro pri Lingvistiko en la Universitato de Oslo (Norvegujo) . Inter la miloj da lingvoj kaj idiomioj parolataj sur la planedo, Theil elektis tia tiun lingvon, parolatan de ĉirkaŭ 350 indiĝenoj de iu regiono ĉe la rivero Maicio, en la brazila Amazonio.

Kvazaŭ lingvo el alia mondo, la pirahaa estas tre aparta signosistemo laŭ la prononcmansiero, en kiu la intonacioj estas esence gravaj. Ekzemple, la vortoj " amiko " kaj " malamiko " estas samaj, sed kio distingas unu de la dua tio estas la intonacio.

La pirahaa povas esti parolata, kantata kaj eĉ fajfata. En vero la idiomio bazas sin sur aro da malaltaj sonoj transendeblaj tra grandaj distancoj. Tio ebligas al ĝiaj uzantoj orientiĝi pli efike en la tuta ĝangalo kaj havigas al ili

	<p>konsiderindan avantaĝon en interkomunikado dum la torentaj pluvoj en Amazonio.</p> <p>Ĉu ĝi estas ĉies lernebla? Tiu idiomo havas verbojn nur en la preterito kaj en la futuro, kaj tiuj ĝiaj tensoj estas konjugacieblaj per eĉ 65. 000 malsamaj manieroj! Krom tio, ne ekzistas singularaj nek pluralaj substantivoj. La kunteksto de la frazo diras, ĉu oni parolas pri unu aŭ pluraj aferoj, kiel informas la retportalo Science Nordic.</p> <p>La pirahaa havas nur tri vokalojn kaj ok konsonantojn, tamen multaj specifaj sonoj havas la signifon de tutaj vortoj. Multfoje la transliterumoj estas intuicie identigeblaj, tamen, se oni ne konos kelkajn regulojn de la idiomo, oni tute ne povos komuniki ideojn. Fakuloj kredas, ke, pro ĝia komplekseco, plenlerni tiun idiomon postulus ĉirkaŭ 10 jarojn al homo kun mezbona memorkapablo. Fakuloj eltrovis kelkan similecon inter vortoj en la pirahaa, la angla kaj la portugala. Tamen multaj el tiaj vortoj havas malsamajn signifojn, kio malfaciligas ankoraŭ pli ĝian lernadon.</p>
--	---

Kelkaj fotografiaĵoj petas multan produktadon kaj prilaboradon, por fariĝi perfektaj, dum aliaj bezonas unu ĝustan sekundon, por fariĝi nekredeblaj! Konstatu malsupre:

La uragano Patricia, kiam ĝi estis atinganta Meksikion.



Iu ludanta per ludaŭto, kiu estis manmovata sur la verando de lia domo.





Iu ĝirafa ludanta per aviadilo.



Tiu kato estas iom timida.



Tiu veziko estis eksplodigata en la ĝusta momento.



Tio ja estas vera arto!



Litkrovilo.



La okulvitroj plej koloraj.



Ha!



Tio ja estas ribela malobeaĵo.



Ĉu vi volos?



Tiu historio pri la cikonioj estas vera!



Kunuloj de flugirado.



KUBO KONSENTAS PARDONON AL 787 KONDAMNITOJ, POST PETO PRI INDULGO DE LA PAPO



Kubo deklaris en la lasta mardo, la 15-a, ke ĝi konsentas la pardonon al 787 kondamnitaj, kiel respondo al peto de la Papo Francisko al ĉiuj ŝtatestroj pri agoj de indulgo, kadre de la Sankta Jaro de la Mizerikordo.

Inter la liberigitaj devas esti virinoj, junuloj, malsanuloj kaj " aliaj kategorioj ", laŭ la ĵurnalo de la Komunisma Partio, la Granma.

Kubo, kiu neadas havi politikajn malliberigitajn, asertis, ke la kondamnitaj pro murdo, seksperforto, seksa misuzo de infanoj kaj ŝakrado de drogaĉoj estos neinkluzivitaj en la pardonprocedon.

La Papo Francisko elektis la temon de la mizerikordo por la Sankta Jaro, kiun la romkatolikoj komencis celebri en decembro de la

pasinta jaro. La periodo, oficiale proklamita de la ĉefpontifiko kiel la Eksterordinara Jubileo de la Mizerikordo, finiĝos en la venonta dimanĉo (la 20-a) . Komence de ĉi tiu monato, dum speciala meso de la Jubileo por la prizonuloj en la urbo Vatikano, la Papo petis al la aŭtoritatoj de la tuta mondo, ke ili konsideru " la eblecon realigi iun agon de indulgo por la malliberigitoj, kiujn ili opinios, ke ili povos havi bonan profiton de tia preskribo " .

LA RESPUBLIKO BRAZILIO KOMPLETIGAS 127 JAROJN



EKSPERIMENTO ĈE SIMIOJ ALPORTAS ESPERON AL CERBOPARALIZULOJ



En Svisio, sciencistoj sukcesis paŝigi du simiojn kun certoparalizo, post cerba enplantaĵo.

Unu daŭris staranta dum ĉirkaŭ ses tagoj, post kiam ĝia spina medolo (aŭ mjelo) estis parte tranĉita, dum la alia eltenis dum ĉirkaŭ du semajnoj.

La faro estas rigardata kiel granda disvolviga rimedo en la esplorado de kuracoj por la homoj perdintaj la kapablon movi siajn membrojn, pro akcidento aŭ pro CVA (cerbovaskula akcidento) .

La medicinistoj esperas, ke la enplantaĵo, nomita ‘cerba-vertebra interfacio’, povos baldaŭ ebligi al la homoj, kiuj havas gravan paralizon, reakiri la movojn de siaj brakoj kaj kruroj.

La enplantaĵo, kiel sugestas ĝia nomo, funkcias kiel ponto sen fadenoj inter la cerbo kaj la vertebro. Ĝi detektas la funkciajn neŭronojn en la motora kortekso, kiu kontrolas la movadon kaj sendas informojn al iu simila matrico de elektrodo en la vertebroj de la rezusoj.

Kiel raportas la brita *Express*, tiuj enplantaĵoj estis metitaj en ‘Retkaptejojn’ sur la lumba regiono, kaj ili respondecas pri la fleksado kaj

	<p>etendado de la kruraj muskoloj.</p> <p>La sciencistoj lokis ilin sub la lezaĵon – partan lezitan lokon, kiu apartigis la nervojn de unu flanko, paralizante unu solan kruron ĉe ĉiu simio.</p> <p>Tio ĉi estas la unua fojo, kiam tiuj metodoj estis uzataj por rebonstatigi la kompleksajn strukturojn de la muskola aktiveco de la kruro kaj ankaŭ la kunordigon de la paŝmovoj.</p> <p>Unu el la simioj reakiris iom da movo de la kruroj, en la unua semajno post la lezo, sen trejno – kaj sur rulpaŝilo, kaj sur la planko, dum la alia bezonis dek kvin tagojn por reakiri la saman nivelon.</p> <p>=====.</p> <p>La esploro, kiu utiligis simiojn rezusojn, estis gvidata de la Federala Instituto pri Teknologio de Svisio, kaj estas publikigita en la scienca revuo <i>Nature</i>.</p>
--	--

10 MIL PRILUMITAJ LIBROJ SENPAGAJ SUR LA STRATOJ, EN KANADO



	<p>Iu manifestiĝo por porti kulturon al stratoj plenaj je aŭtotrafiko kaj poluaĵoj.</p>
--	---

	<p>Iu anonima grupo havis literaturan iniciaton en unu el la stratoj plej movoplenaj de la urbo Toronto, en Kanado.</p> <p>Kun la helpo de 50 volontuloj, kiuj laboris dum 12 tagoj, pli ol 10 mil libroj donacitaj de la Armeo de la Savo (internacia protestanta movado, kiu nuntempe agadas en 118 landoj) estis dismetitaj sur la Straton Hagermanon.</p> <p>La ideo estas de la projekto <i>Literature Vs Traffic</i>, kreita de <i>Luzinterruptus</i>.</p> <p>" La libroj restos tie, por ke la homoj prenu ilin. La instalaĵo estas memsubtenebla kaj daŭros tiom, kiom la homoj volos " , tiel skribis la organizantoj en sia retejo.</p> <p>En la fino la instalaĵo estis daŭrinta 10 horojn, sed ĝia bildo restos multe pli longe en la memoro de la homoj, kiel asertis la retejo Bored Panda.</p>
--	---

PAKISTANO FORPATRUJIGOS TIUN AFGANINON, KIU POZIS POR KOVRILO DE NATIONAL GEOGRAPHIC



Sharbat Gula, la afganino, kiu famiĝis ankoraŭ knabinaĝe, kiam ŝi stampis la kovrilon de iu numero de la revuo *National Geographic* (en 1985), estos liberigita kaj elpatrujigita en la venontaj tagoj, post kiam ŝi suferos la punon de 15 tagoj da prizono, kiu estis trudita al ŝi en tiu ĉi vendredo (la 4-a), de pakistana tribunalo.

Ŝi estis arestita en Pakistano, pro kontraŭleĝa posedo de identigaj dokumentoj.

" Kun granda plezuro, mi anoncas, ke Sharbat Gula jam estos libera de la problemoj kun la Leĝo, kiujn ŝi spertis en la lastaj semajnoj. Ŝi estas baldaŭ liberigota " – asertis, en sia fejsbuka paĝo, la ambasadoro de Afganio en Pakistano, Omar Zakhilwal.

Mohsin Dawar, unu el la tri defendaj advokatoj de Gula, diris al la novaĝ-agentejo Efe, ke iu speciala tribunalo pri kontraŭkoruptado, en la urbo Peŝavaro (en la nordokcidento de Pakistano) kondamnis ŝin, en ĉi tiu vendredo, al 15 tagoj da prizono, el kiuj ŝi jam plenumis la plimulton, post kiam ŝi deklaris sin kulpa pri ĉiuj akuzoj.

Krom tio, ŝi devos pagi monpunon je 100 mil pakistanaj rupioj (860 eŭroj) kaj devos foriri de Pakistano, tuj post sia liberiĝo.

Gula estis arestita en la 26-a de oktobro, pro tio, ke ŝi supozeble akiris identigajn

	<p>dokumentojn por si kaj por siaj supozataj filoj, subaĉetinte tri funkciulojn, riskante ricevi punon de eĉ 14 jaroj da mallibereco.</p> <p>La rifuĝintino, aĝanta ĉirkaŭ 40 jarojn, patrino de kvar filoj kaj malsana je hepatito C, reiros al Afganio en la venonta lundo, kie ŝi estos akceptata de la prezidento de la lando, Ashraf Ghani, kiel informis Zakhilwal. Laŭ la diplomato, Gula ricevos helpon de la registaro, por komenci novan vivon en sia naskolando, kie ŝi preskaŭ ne vivis.</p> <p>La usona fotografisto Steve McCurry senmortigis la vizaĝon de la afganino en 1984, kiam ŝi havis 12 jarojn, en iu rifuĝejo en Peŝavaro, per fotografaĵo, kiu estis publikigita unu jaron poste, kaj kiu turniĝis en unu el la bildoj plej famaj en la 20-a jarcento.</p>
--	--

LA SUPERLUNO EN LA 14-A DE NOVEMBRO ESTOS LA PLEJ GRANDA EL LA LASTAJ CENT JAROJ



	<p>La Superluno, kiu okazos en la venonta dato 14-a de novembro, estos la plej granda kaj plej brilanta plenluno el la lastaj cent jaroj. La lasta fojo, kiam la Luno tiel alproksimiĝis al la Tero, estis en la 26-a de januaro 1948, kaj la posta tia fenomeno devos okazi denove nur en la 26-a de novembro 2034.</p>
--	--

	<p>Dum la Luno faras siajn rondirojn ĉirkaŭ nia planedo, ĝia distanco multe ŝanĝiĝas inter ĝia punkto plej proksima al la Tero (perigeo) kaj ĝia punkto plej malproksima (apogeo) . Kio difinas la proksimecon de Luno disde la Tero estas la hor-diferenco inter la ĝusta momento de ĝia plena fazo kaj la ĝusta momento de ĝia plej granda proksimeco al la Tero. Ju pli malgranda estos tiu diferenco, des pli granda kaj brilanta estos la Superluno. Krom tio, la Superluno de novembro 2016 havos perigeon pli proksiman ol ordinare.</p> <p>Ĉar la Luno havas gravitan potencon tre grandan super nia planedo kaj influas grandan parton de la tajdoj de niaj oceanoj, la oceanaj tajdoj iĝos pli fortaj kaj pliintensiĝos dum la Superluno. Se vi estos proksima al marbordo en tiu dato, restu singardema, ĉar la ondoj devos atingi ekstrapajn altojn.</p>
--	--

USONA SCIENCISTO STUDIS 40 MIL KAZOJN: LA PREĜADO KAJ LA MEDITADO HAVAS LA POVON KURACI MALSANOJN



	<p>D-ro Andrew Newberg, el la Nordamerika Universitato Thomas Jefferson, estas unu el la multaj esploristoj, kiuj asertadas la povan efikon de la preĝo kaj de la meditado en la kuraco de malsanoj. Li faris studojn ĉe 40. 000</p>
--	--

pacientoj, bazitajn sur la magnetna resonanco, kaj prezentis siajn priajn konsiderojn en la libro " *How God Changes the Brain* " (" Kiel Dio Ŝanĝas la Cerbon "), lanĉita en 2009. De tiam pluraj aliaj esploroj plifortigis tiun konkludon.

En siaj eksperimentoj D-ro Andrew selektis maljunajn homojn havantajn problemojn pri memoro, por observi ilin antaŭ, dum kaj post ilia falo en meditojn kaj faro de preĝoj. La studoj estis farataj po 12 minutoj tage, dum 8 semajnoj, kaj montris, ke la preĝado kaj la meditado povas doni rezultatojn tre favorajn al nia sano.

Kiam ili estas regule farataj, la preĝoj kaj la meditado pligrandigas la aktivadon de la cerbo, per maniero simila al tio, kio okazas pri la komunikado, funkciante kiel ia " fizika ekzerco " por la menso kaj rezultigante cerban elvolviĝon kaj eĉ la kuracon de diversaj malsanoj.

Aliaj studoj, antaŭaj kaj postaj al tiu de D-ro Andrew Newberg, alvenis al la sama konkludo. Unu eksperimento publikigita en la revuo *Kancero*, el la Usona Societo pri Kancero, por ekzemplo, atestas, ke la pacientoj kun solidaj spiritaĵoj reagis pli efike al la traktado. La esploristoj de la *Moffitt Cancer Center*, en la usona ŝtato Florido, observis, ke la homoj, kiuj kredas je iu " supera povo " , havas pli bonan socian kunvivadon kaj pli da fizika kaj mensa sanoj, ol tiuj, kiuj asertas ne kredi prie.

=====.

Kompreneble, la preĝado kaj la meditado ne nepre devas obei ritojn aŭformojn religiajn. Ili povas esti praktikataj de iaj ajn personoj, inkluzive de nereligiaj. Sufiĉas nur, ke oni komuniĝu kun la Alto aŭ kun la Alto kiu estas en si mem, per la menso kaj per la koro.

((♥))))))))))))))))))))))))))))))

LA HISTORIO DE LA TAGO DE LA MORTINTOJ



	<p>En ĉiu kulturo aŭ civilizacio estis speciala atento direktata al la forpasintoj, jen tia atento motiviĝis de religio, jen ne.</p> <p>Rimarkeblas, laŭlonge de la Historio, diversaj ritoj pri sepulto, kiel la kremacio, la mumiigo, la enterigo en tombojn kaj en urnojn el ceramiko aŭ ŝtono, same kiel la depono de la korpoj de la forpasintoj en maŭzoleojn.</p> <p>Grandaj monumentoj, kiel la piramidoj de Gizo kaj la Taĝ-Mahalo, estis konstruitaj por enlokigi la mortrestaĵojn de gravegaj personoj.</p> <p>En la okcidenta mondo la 2-a de novembro estas dediĉata al la rememoro al la forpasintoj.</p> <p>La celebros de tia tago, popularigita de la katolika tradicio, estis komencigita en la periodo de la Malalta Mezepoko.</p> <p>La Tago de la Mortintoj, kiel ĝi estas konata, estis starigita komence de la 10-a jarcento, en la benedikta abatejo de Kluno, en Francio, fare de la abato Odilo (aŭ, kiel kultata de la katolikoj, Sankta Odilono [962-1049]). Odilo de Kluno proponis, en la 2-a de novembro 998, al la membroj de sia abatejo, ke, ĉiujare, en tiu tago, ili dediĉu siajn preĝojn al la animoj de</p>
--	---

	<p>tiuj, kiuj jam forpasis. Tiu iniciativo de Odilo renovigis unu el la ĉefaj elementoj de la katolika mondkoncepto, nome, la perspektivon, ke granda parto de la animoj de la " mortintoj " estas en la tiel nomata " Purgatorio " , travivanta procedon de puriĝo, por povi ascendi al la tiel nomata " Paradizo " .</p> <p>En la puriĝado, la animoj bezonas, laŭ la katolika doktrino, preĝojn de la vivantoj, kiuj povas peti por ili la dian mizerikordon kaj la propeton de la sanktuloj, de la Virgulino Maria kaj de la ĉefa peranto – Jesuo Kristo. Dum la jarcentoj de la Malalta Mezepoko (de la X-a ĝis la XV-a) , la uzado de la preĝoj por la animoj de la forpasintoj en tiu specifa dato fariĝis tre populara en Eŭropo, kie ĝi iĝis konata sub la alnomo " Tago de Ĉiuj Animoj " .</p> <p>Tiu kutimo havas sian originon en la periodo de la primitiva Kristanismo, dum la jarcentoj 2-a kaj 3-a, kiam la kristanoj, persekutataj de la Romia Imperio, enterigis kaj preĝis por siaj " mortintoj " , en la subteraj katakomboj de la urbo Romo.</p> <p>Post la eltrovoj de Ameriko kaj la procedoj de koloniado, la tago difinita de Odilo de Kluno fariĝis ankoraŭ pli populara.</p> <p>En la nuntempaj tagoj, malgraŭ la granda procedo de sekularigado, kiun la okcidenta civilizacio suferis en la daŭro de la Moderna Epoko, la Tago de la Mortintoj daŭras speciala dato, en kiu la rememoro pri la forpasintaj amataj personoj venas al ni en la kapon kaj en kiu, ankaŭ, milionoj da homoj iras al la tombejoj, porti florojn, kandelojn, sentojn kaj preĝojn.</p> <p>=====.</p> <p>Tio estas perata aŭ simboligata maniero eksterigi verajn sentojn. Ĝi meritas, do, la</p>
--	--

	<p>respekton kaj komprenemon de tiuj aliaj, kiuj ne kunpraktikadas ilin.</p>
--	--

	<p>Alvenis la monato novembro kaj, kune kun ĝi, la (internacia) kampanjo pri la Blua Novembro, kiu avertas la socion pri la prevento de la prostatkancero. Same kiel la Roza Oktobro, kiu celas la preventon de la mamkancero, la kampanjo de novembro volas disvastigi priajn informojn al la viroj, iliaj kunulinoj kaj iliaj familioj.</p> <p>En Brazilo, la kancero de prostato estas la dua tumoru plej ordinara inter la viroj (post nur la melanono (haŭtkancero)). Laŭ absolutaj nombroj, ĝi estas la sesa plej komuna malsano en la mondo kaj la plej ofta ĉe la viroj, reprezentanta ĉirkaŭ dek procentojn de ĉiaj kancerroj.</p> <p>Ĝia okazado estas pli ofta en la tria vivofazo (pli konata kiel ‘tria aĝo’), tamen ekde la 40-a jaro jam estas necese submetiĝi al la (tuŝ) ekzameno de la rektumo, far iu urologo (aŭ proktologo) . Tia tumoru estas identigebla ankaŭ per sangoekzameno (kvankam, kiel dirate, ne tiel efike kiel la rektuma tuŝo) . Se la prostakkancero estos identigita en sia komenciĝo, estos eble trakti ĝin aŭ eĉ kuraci ĝin. Sed se ĝi estos eltrovita en fazo tre pli posta, ĝi kaŭzos nepovecon de erekto kaj sterilecon.</p> <p>La prostato estas tre malgranda glando, kiun nur la viroj posedas kaj kiu situas tuj sub la urinveziko kaj antaŭ la rektumo. Ĝi envolas la komencan parton de la uretro - la urintubo tra kiu la urino elfluas el la veziko. Ĝi respondecas pri la produktado de parto de la spermo.</p> <p>=====</p> <p>La movado Blua Novembro komenciĝis en Aŭstralio, en 2003, profitanta la eventojn pri la Monda Tago de la Lukto kontraŭ la Prostatkancero, realigatajn en la 17-a de novembro.</p>
--	--

Ambaŭ temo estas aktuala kaj interesa, pri la kancero ege utila al kiuj ne konas la problemon.

- La gelernantoj de Sebuhoru

Samideano Sebuĥoro delonge instruas esperanton al multaj infanoj en sia loko. Li ege bezonas helpon je lerniloj diversaj.



Sebuĥoro kun siaj gelernantoj

- [Edukado.net](#)

15 novaj premiitoj en la PANTEONO

Kategorio: Edukado; **Dato:** 2016-12-12 00:52:29

Ni kun ĝojo anoncas al vi ke ankaŭ ĉi-jare, okaze de nia jubilea 15a datreveno, ni premias 15 meritplenajn kolegojn kaj prezentos ilin en nia [Panteono](#).



Suzanne BOUROT
1936 -
Francujo



Michel DECHY
1947 -
Francujo



Roman Dobrzyński
1937 -
Pollando



Emilia Guadalupe Vega
1944 -
Meksiko



Natalia KASYMOVA
1955 -
Rusujo



Jolanta Aldona KIERES
1952 -
Pollando



Aranka LASLO
1969 -
Serbujo



Malley Martínez Mateos
1977 -
Meksiko



Fabrizio Angelo Pennacchietti
1938 -
Italujo



Nina Pietuchowska
1950 -
Pollando



Ariette PLUTNIAK
1948 -
Francujo



Edmond PLUTNIAK
1943 -
Francujo



Llibert PUIG
1933 -
Hispanujo



Wei Yubin
1965 -
Ĉinujo



Peter WEIDE
1947 -
Germanujo

• VORTBELECO EN ESPERANTO jam la DUA

En Vroclavo, la 2-4an de decembro okazis jam la dua " Vortbeleco en Esperanto ", kiu ĉifoje daŭris tri tagojn kaj konsistis el tri partoj, el la **Festivalo de Deklamata Poezio**, la **Konkurso de Laŭta Legado** kaj **vizitado de Vroclavo**.

La evento denove estis preparita de la Centro de Interkultura Edukado – Vroclavo (CIE-V) kune kun neesperantista organizaĵo " Horizonte " kaj **patronoj** estis la **Marŝalo de Malsupra Silezia Vojevodio kaj Pola Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**.

" Vortbeleco en Esperanto " estis destinita por infanoj, gejunuloj, plenkreskuloj kaj

pliaguloj. Presentadon de poeziaĵo kaj prozaĵo **prijuĝis profesia kaj internacia ĵurio**, Wera Blanke, Istvan Kabok, Małgosia Komarnicka kaj Andrzej Kraszewski. En la pritakso estis konsiderataj: lingvakorekteco, parolmaniero, originaleco, elekto de ĝustaj kaj estetikaj valoroj. La premioj estis aljuĝitaj laŭ aĝkategorioj.

La publikon, gastojn, ĵurion kaj la partoprenantojn salutis Małgosia Komarnicka (la prezidantino de CIE-V), kiu mallonge prezentis historion de Esperanto. La festivalon lerte gvidis Halina Kuropatnicka-Salamon (la vicprezidantino de CIE-V).

La 2an de decembro, vendredon okazis la **Festivalo de Deklamata Poezio** dum kiu ĉiu partoprenanto prezentis **unu poeziaĵon en Esperanto** dum la nesuperebla tempo de tri minutoj. La unuajn premiojn gajnis: Michalina Gnacek (ĝis la aĝo 18 jaroj), Wojciech Ławnikowicz (de 18 ĝis 54 jaroj) kaj Monika Radomska (je la aĝo super 55 jaroj).

La 3an de decembro, la sabaton okazis la **Konkurso de Laŭta Legado** dum kiu ĉiu partoprenanto legis **elektitan de si tekston en Esperanto** dum la nesuperebla tempo de kvar minutoj. La unuajn premiojn gajnis: Maja Gumienna (ĝis la aĝo 18 jaroj), Magdalena Piętka (de 18 ĝis 54 jaroj) kaj Lidia Fit (je la aĝo super 55 jaroj).

La 4an de decembro, dimanĉe la organizantoj, gastoj kaj partoprenantoj matene ĉeestis en la **sankta meso**, kiun celebris la pastro prelato Stanisław Pawlaczek en la preĝejo de Sankta Marteno (unu el la plej malnovaj preĝejoj de Vroclavo). Poste gvidataj de vroclava ĉiĉeronino ĉiuj admiris la konstruaĵon Hala Stulecia (la Halo de la Jarcento), kiu en la jaro 2006 estis enskribita en la liston de Mondaj Kulturaj Heredaĵoj de Unesko. Grava punkto de la **ekskurso** estis ankaŭ vizitado de la nova parto de vroclava ZOO – Afrykarium. Ĝi estas komplekso (la unua kaj sola en Pollando), kiu prezentas akvan kaj kontinentan ekologiajn sistemojn de la afrika-faŭno.

La festivalon akompanis escepte familia etoso. Ĉiutage dum la paŭzo ĉiuj estis invitataj je bongustaj kukoj, dolĉaĵoj, kafo, teo kaj trinkaĵoj kaj dimanĉe ankaŭ estis regalitaj per tagmanĝo. Ĉiun konkursan tagon finis arta programo. Vendrede okazis la **koncerto** de vroclavaj muzikistoj kaj kantistoj, Armand Perykietko, Wojciech Ławnikowicz kaj Radosław Tokarz kun muzikteamo. Sabate aplaŭdon elvokis **poezie-pentroarta programo** en kiu Halina Kuropatnicka-Salamon deklamis sian poezion kaj Małgorzata Szalek kune kun sia malgranda fileto pentris bildojn al la deklamata poeziaĵo. Ĉiuj bildoj estis disdonitaj al la publiko. La dutagan konkurson finis koncerto de Leszek Kopec.

Nia celo por vigligi la kunlaboron kun neesperantaj medioj kaj disvastigi Esperanton **estis atingita** kaj ni jam invitas ĉiujn por partopreni en la sekva, la tria " Vortbleco en Esperanto " .

Ni ankaŭ tre kore invitas maje al Vroclavo kie 18-22 de majo 2017 okazos la Dua Interkultura Majrendevuo. Ĝia programo estos tre riĉa kaj konsistos el Internacia Simpozio, el la Kvina Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, multaj interesaj laborsesioj, artaj programoj kaj prelegoj kaj ekspozicioj pri Esperanto.

Je la nomo de la organizantoj
Małgosia Komarnicka
la prezidantino de
Centro de Interkultura Edukado - Vroclavo



•

Alvoko por la Internacia Virina Tago 2017

(Skribas OSIOKA Taeko el la urbo Hirosima, Japanio.)

Ni Hirosima Esperanto-Centro kiel unu el 21 organizoj sub la Plenuma Komitato de Internacia Virina Tago 2017 Hirosima sendas al vi mesaĝon. Ni petas vin doni al ni vian respondan mesaĝon por la Tago, kaj transdoni nian mesaĝon al viaj geamikoj, viaj asocioj. Ni ekspozicias vian mesaĝon ĉe publika ejo de la urbo Hirosima.

Limdato estas la 15-a de februaro 2017, ĉar ni havos ekspoziciojn de la mesaĝoj ek de la 25-a de februaro.

Kun antaŭdanko, OSIOKA Taeko

Bonvole donu al ni vian mesaĝon por 2017,

- 1) Kio estas grava por paco laŭ via opinio ? (en 5 linioj)
- 2) Se vi sendos vian portreton, ni prezentos kun via mesaĝo.

S-ino MATUMURA Aiko

Kontaktoadreso: OSIOKA Taeko osioka@mua.biglobe.ne.jp

Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hirosima, 734-0041 Japanio

• **Respondo el Albanio**

Laŭ mi la packondiĉoj estus:

1-Vera demokracia sistemo enlande. (plurpartieco; jura ŝtato; respekto de homrajtoj; respekto al malplimultoj; senpartia edukado, amaskomunikiloj, arma kaj polica servo.

2-Amikaj interrilatoj kun la najbaraj kaj regionaj landoj; edukiĝo de internaciismo kaj

kunlaboremo kun la aliaj popoloj kaj landoj je intereso de paco kaj komuna prospero; respekto de la alies kulturo, religio, politikaj kredoj ktp; batalo kontraŭ terorismon kaj totalitarismon en ajnaj ties formoj.

3- La komuna protektado de la medio, terglobo, klimato, akvotrezoroj, kaj aliaj riĉaĵoj de la homaro; la suspendio kaj ne plua disvolviĝo de la amasmortigaj armiloj.

4- La adaptigo de komuna regiona dua lingvo, de tutmonda dua helplingvo (kiel Esperanto)

5- Investado fare de riĉaj landoj en la malriĉaj landoj cele al dungado kaj pluevoluiĝo de ĉi lastaj.

Amike Bardhyl Selimi



Viro, pensiulo 71 jara, eksa instruisto de matematiko, civitano de Tirana, Albanio

Leteroj

- Andy Kuenzli

<http://www.liberafolio.org/2016/la-retejo-ipernity-fermigis-en-januario>

Ĉi tiu punkto estas grava kaj oni ne sufiĉe konsideris ĝin ĝis nun: En kazo de fermo de tia socia reto, tuta virtuala Eo-movado povas malaperi.

<https://teokajlibroj.wordpress.com/2016/11/30/cu-ekzistas-du-movadoj/>

interesa artikolo, kiun mi ricevis de korespondanto, kun trafa kaj prava rigardo al la aferoj. Mi grandparte dividas la asertojn, kiuj kongruas kun mia malnova hipotezo, ke la virtuala movado de la interreto ne povos anstataŭi (aŭ savi) la tradician Eo-movadon, ĉar ambaŭ funkcias laŭ diversaj logikoj, kiujn la aŭtoro de tiu kontribuaĵo priskribis. (punkto 11 de http://www.planlingvoj.ch/13_HIPOTEZOJ_PRI_ESPERANTO_2012.pdf)

Estus bone, se la aŭtoro aŭ iu alia korektus la diversajn gramatikajn kaj tajperarojn en la teksto de Robert Nielsen.

Pledo por "Alia Esperanto-movado":

LA ESPERANTO-MOVADO MALTRAFIS LA OKAZON POR LEVI ESPERANTON SUR PLI ALTAN NIVELON

Alivorte: La Esperanto-movado mem kulpas pri sia fiasko en la "ekstera mondo"

La aŭtoro esperas, ke ĉi tiu hipotezo povas helpi pli bone kompreni la ekzistantajn problemojn de Esperanto kaj faciligi la reanlizadon kaj reekzamendon de la celaro de la internacia Esperanto-movado,¹ por liberigi ĝin de la ideologia balasto, de la propagandisma idioteco kaj de la iluzioj de la pasinta tempo kaj por eventuale provi rekomencan sur nova fundamento (kvankam la tempo por Esperanto probable pasis). Studinte dum pli ol 30 jaroj la Esperanto-movadon kaj ties historion, la aŭtoro venis al la sekvaj konkludoj kaj hipotezoj pri la karaktero kaj problemoj de la Esperanto-movado, kiujn li prezentas okaze de la 125-jarjubileo de Esperanto. (Kadre de la verkado de germanlingva versio, la Esperanto-versio de tiuj hipotezoj estis prilaborataj en somero 2015).

La unuopaj hipotezoj estas:

1. Esperanto ekzistas dank' al la judeco de L.L. Zamenhof kaj al la tiama cionisma debato pri la "juda demando".

2. La lingvo Esperanto ne estas tiel facile lernebla kiel asertas la oficiala propagando.

3. Ĉio kio ĉis nun estis produktata kaj farata en Esperanto okazis en la nomo de la propagando. Eĉ la Esperanto-beletristiko estis kreata sub la signo de la propagando kaj eksperimentado por pruvi, ke Esperanto taŭgas kiel lingvo de la literaturo.

4. Ne la t.n. "interna ideo" de Esperanto sed la paranojaj malamo de la esperantistoj kontraŭ la angla lingvo kaj la anglalingvaj landoj (t.e. la Okcidento en pli larĝa senco) kunktenas *hodiaŭ* la Esperanto-movadon. Pro tio potencialaj subtenantoj kaj 'amikoj' de Esperanto estas diversspecaj skeptikuloj kaj kontraŭuloj de la angla lingvo en la tuta mondo, kaj pro tio ekzistas varma reciproka simpatio inter la Esperanto-movado kaj landoj kiel Ĉinio, Ruslando, Brazilo, Kubo (Sudameriko entute), Vietnamio k.s.

5. Dum en la libera Okcidento Esperanto fariĝis viktimo de la politika maldekstrisma kaj (oseŭda aŭ kriptaj) religia sektismo (ekz. SAT, baha'a movado), en la 'socialismaj' landoj la ideoj de Zamenhof estis uzurpataj por falsa naciistiko kaj misuzata por ideologia-politika propagando. Tiel Esperanto fariĝis viktimo de ideologioj, fremdaj al ĝi, kaj de la Malvarma Milito. Per la kolapso de la komunismo kaj la fino de la Malvarma Milito (1989-91) Esperanto aŭtomate perdis en tiuj landoj siajn signifon, senco kaj esencan kaj sian (politikan) ekzistarojn.

6. La Esperanto-movado, miksaĵo inter religia sekto kaj politika partio, kin montras skizofreniajn, paralelsociajn trajtojn, faris nenion esencan kontribuon al la paco, nek al la homaj kaj minoritataj rajtoj, kaj la (internacia) "lingva problemo" ne estas solvebla per Esperanto.

7. Neŭtraleco ekzistas nek en la kazo de la lingvo Esperanto (lingvistike), nek en la kazo de la Esperanto-movado (politike). La neŭtraleco de Esperanto estas nenio alia ol aserto, imaga (fantazio) kaj invento (fikcio) de la Esperanto-propagando. La 'politika neŭtraleco' faciligis al la esperantistoj, nerekte a) apogi la komunismojn kaj rifuzi la kapitalismojn kaj, b) prisilenti la gravajn lezojn de la homaj rajtoj en la Tanajlaj ŝtatoj, por samtempe akuzi la okcidentajn ŝtatojn, precipe Usonon, pro tiuj problemoj, mankoj kaj eraroj sur la kampo de la homaj rajtoj en tiuj landoj.

8. Interlingvistiko servas/is precipe kiel propaganda instrumento (aŭ "armilo") por ('science') pravigi la laŭdiran superecon de la planlingvoj super la naturaj lingvoj kaj de Esperanto super la angla lingvo.

9. Esperantistoj kiel tiaj interesiĝas/is nur pri Esperanto. La "ekstera mondo" malinteresiĝas/is pri Esperanto, ĉar la esperantistoj ignoras/is la "eksteran mondon", t.e. la ignorado de la Esperanto-movado

¹ Kiel „internacian Esperanto-movadon“ (sekve: Eo-movado) la aŭtoro komprenas unuavice la UEA-movadon kun ties sistemo de Landaj kaj Fakaj Asocioj, kiuj estas integra parto de tiu Eo-movado. Alia Esperanto-movado en principo ne ekzistas. Eĉ tiuj kelkaj aŭtonomismaj Eo-ĉeloj, kiuj agas ekster UEA kaj kiuj eĉ konsideras sin opoziciaj al ĝi, esence reprezentas la saman ideologion kiel la finvenkisma UEA-movado, kvankam ilia propagando volonte asertas ion alian.

- Karaj esperantoj-turistoj,

La organizantoj de la Itala Kongreso devas elekti temon ne pro merkatikaj motivoj, sed pro soci-organizaj.

Chu la demando pri italeco au mediteraneco de la estonta kongreso de IEF estas parto de iu nova vento en Italujo?

Chu tiu vento estas geo-politika vento au Esperanto-politika vento?

Chu italaj organizantoj volas doni signalon, ke la (kunlaborado kun la) landoj de Meza Maro estontece decidus la politon de IEF?

Al kio apartenas Italujo, estonte-strategie, kiom koncernas Esperanton?

En si estas aprezinde, ke italaj esperantistoj volas rigardi transsiaj limoj. Italujo felice havas malferman landan asocion,

ne kiel multaj aliaj landaj asocioj, kiuj fermas siajn landlimojn por eksterlandanoj, konforme al (aliaj) shtatoj kiuj konstruas kradmurojn kontraŭ rifughintoj.

Sed anstataŭ merkatikan motivon mi shatus vidi iun konvinkon de ghuste la Italoj, ke ILIA interna ideo ne haltas che la landlimo,

ekzemple ke ili serchas aliancajn popolojn, kun kiuj ili interkonsentas intensan kunlaboradon: literatur-traduke, lerneĵ-interŝanghe, urbo-ghemele,

intencite kaj planite en sia laborplano. Landoj jam ekde la greka kulturperiodo havis

kontinentvastajn kontaktojn. Poste Italujo havis koloniajn ligojn

kun Libio, Albanujo, Etiopujo.. Se esperantistoj – ĉar mi ne direktiĝas al la organizantoj de la IEF-kongreso, ĉar mi malamas ĝin

(kiel verŝajne Renato Corsetti asertos) , sed ĉar mi amas ĝin - kaj **nerekte mi direktiĝas al ĉiuj organizantoj de naciaj kongresoj.**

Pro tiu amo mi kritikis la aperte merkatikan aliron al la varbado de kongresantoj. Ne la mezmara strando au la muziko estu la ĉefa altiraĵo,

sed la espero de la esperantoj en mondo, kie la memprotektismo daŭre pli gajnas kaj anstataŭ politike reagi multaj esperantistoj regas per indiferentismo, senespero.

Memoru la (naivajn) klopodojn de Lejzer Zamenhof, la diplomatajn streĉfarojn de Edmond Privat, la kuraghajn, kvankam foje mistonajn mobilizadojn de Lapenna.

Johan Derks

- Volontula asocio en Afriko

Retadreso : avolar.asbl@yahoo.fr / avolar.asbl@hotmail.fr



-

La rezulto kaj konkludo de miaj historiaj esploroj pri la Esperanto-movado estas, ke UEA praktike nenion faris favore al la Homaj Rajtoj.

Male, la Esperanto-movado aktive adoris kaj subtenis diversajn krimajn reĝimojn, kiuj grandstile lezis la homajn rajtojn: Nazia Germanio (1933), stalinisma Sovetunio (20aj kaj 30aj jaroj), Sovetunio post 1953, socialismaj landoj, Ĉinio, Vjetnamio, Kubo, Irano, diversaj "kanajlaj" triamondaj landoj. La Esperanto-movado nepre ĉiam staris flanke de la potenculaj reĝimoj kaj neniam flanke de la viktimoj, kies homaj rajtoj estis lezataj. En tio konsistas la granda mensogo de la Esperanto-movado rilate la homajn rajtojn. Samtempe, la Esperanto-movado polemikis kontraŭ Usono, Okcidento, kapitalismo, en kiuj ili vidis la ĉefajn malamikojn de la homaro, ĉar,

pere de la angla lingvo, ili praktikas " lingvan imperiismon " (aŭ " hegemonion "), " kulture subpremas aliajn popolojn " kaj " mortigas malgrandajn lingvojn " , do praktikas " lingvan genocidon " (la prezidanteco de maldekstrismaj ideologoj kiel Corsetti, Dasgupta kaj Fettes funkciis plene laŭ tiu spirito) . Kvankam oficiale neŭtrala, la Esperanto-movado alprenis klaran politikan pozicion, kiu estis: por la " Oriento " , kontraŭ la " Okcidento " . Ankaŭ la judajn aferojn la esperantistoj timis kiel la diablo timas la benintan akvon, kaj unuopaj Eo-radikaluloj akre kritikis Israelon (kion oni ja rajtas fari) , sed samtempe ĉiam prisilentis la krimojn de la palestinanoj. Ktp. ktp. ktp. Tiu sinteno estas karakteriza por la politika maldekstro, kiu ĉiam nur unuflanke vidis, kritikis kaj polemikis (precipe kontraŭ Usono, Okcidento, kapitalismo, dekstro) kaj prisilentis la krimojn kontraŭ la homaro en la propra tendaro. Do, la sinteno de la Esperanto-movado rilate la homajn rajtojn, kiu estas esence maldekstra sinteno, devas esti pritaksata kiel ambivalenta (almenaŭ) , sed ĉefe profunde malhonesta, hipokrita kaj malkredinda. La Universalan Deklaracion de la Homaj Rajtoj UEA nur formale kaj rutine subtenis kaj prezentis por plaĉi al Unesko kaj por propagandi la proprajn aferojn, kiuj komplete perdis sian signifon sub la estraroj post Tonkin.

Do, ne sufiĉas nur tiu formala rememorigo kun ligo al la originala teksto, sed necesus aktive agi, eĉ se oni devus kritiki unuopajn ŝtatojn pro lezado de la homaj rajtoj. Sed tion UEA ne faras, timante, ke la kritikita ŝtato povus rifuzi la subtenon al Esperanto, je kiu UEA (vane) esperis de pli ol 100 jaroj. Tiel, la politika hipokriteco (aŭ almenaŭ oportunismo) de UEA longdaŭre verŝajne pli damaĝis ol utilis al ĝi, ol se ĝi estus kuraĝe elpaŝinta por defendi la homajn rajtojn, kion ĝi bedaŭrinde ne faris. Ĉar en tia kazo UEA kaj la Esperanto-movado estus povintaj trovi la necesan respekton, en alia kazo ili ricevis - kaj meritis - nur malrespekton de siaj kritikantoj.

Pri la aktuala stato de la homaj rajtoj vd.

http://www.planlingvoj.ch/Homajrajtoj_2016.pdf

Artikolo pri Fidel Castro kaj Kubo post la morto de la " soldato de Esperanto " :

http://www.planlingvoj.ch/Castro_biografio2016.pdf

A. Künzli, Svislando

www.planlingvoj.ch

- Valnas Banatis

Karaj samidealanoj, ne forgesu la ekvilibrantan principon de sufiĉo kaj neceso. Ne ŝarĝu sur Esperanton ĥimerojn, kies mankon en multegaj lingvoj neniu bedaŭras. Aŭ trovu kiel ekzemplon lingvon kun tia ri-iĉa avantaĝo.. La fundamentaj uzebloj de Esperanto ĝis nun restas ne uzataj, ĉar en multaj lingvoj mankas io, kio kuŝas en Esperanto ne uzate (ĉu vekeble? kiel demandis antaŭ du jaroj Gaetano Speranza en AGON (revuo de Mesina universitato) per 60-paĝa esejo en Esperanto.

Zamenhof mem avertis, ke la konstruo de Esperanto estas tute fremda al la parolantoj de la lingvoj, en kiuj aperis lia " Plena Lernolibro " . Pseŭdofaciligite li priskribis ĝin per rutina, sed neadekvata lerneja gramatiko, por ke la lernantoj ne vidu ian diferencon inter la mekanismo de Esperanto kaj sia propra lingvo. Tiu misgvida priskribo estis fiksita en la Fundamento kaj jam

111 jaroj servas kiel cerbokaĝo aŭ okulŝirmiloj por lernontoj, instruantoj kaj esperantologoj, Fremda gramatiko kun konfuzaj neadekvataj terminoj estas trudata al Esperanto, kies origino restas ne esplorita, kaj la strukturo ne klarigita, La rezultivon de instruado per fremda gramatiko resumis Zlatko Tišljar en sia trioble jubilea konfeso " Mia saĝo post 50 jaroj de instruado de Esperanto " (2012) . Dum Zamenhof neniam parolis pri instruado de Esperanto. Ĉu li eĉ ne intencis Esperanton por instruado? Anstataŭ manko de via seksa indiko, ni plendu pri troa emfazo de seksismo per prefikso ge-, kiu necesas inter parencoj kaj paroj, aktoraj kaj servistaj roloj, sed ne por eksterseksaj okupoj kaj rilatoj. Al la genraj reformistoj mi rekomendas legi The Language of the Goddess aŭ The Alphabet vs the Goddess

- Respondo al Angelos Tsirimokos

Mi ĵus legis la leteron de s-ro Angelos Tsirimokos, publikigita sur la januara numero de Monato. Mi volas precizigi mian opinion rilate la albanojn loĝantaj en Grekio. La albanoj en Grekio konsistas el tri grupoj:

la unua, nomata Arvanitoj, reprezentas la albanan diasporon en Grekio formiĝinta antaŭ la XIII jarcento dum la Bizanca Imperio. Ili nombras sufiĉe multe (eĉ kelkaj milionoj, laŭ historiistoj) sed plejmulte ne plu parolantaj la albanan lingvon pro kultura asimiliĝo far grekoj. Eĉ tuj apude de Akropolo ekzistas kvartalo nomata PLAKA (albano-maljunulino) , plue preskaŭ ĉiuj vilaĝoj ĉirkaŭ Ateno, inkluzive de Maratono, estas loĝataj de tiuj arvanitoj, same en Moreo (Peloponezo) , kaj en aliaj teritorioj de kontinenta kaj insulara parto de Grekio. Arvanitoj kontribuis notinde en la liberiĝo de Grekio kaj en la ties sendependiĝo. La plimulto de ĉefaj 100 ties herooj estas arvanitoj.



La dua grupo konsistas el aŭtoktonaj albanoj loĝantaj en la norda kaj nordokcidenta Grekio en teritorio ĉirkaŭ 10 mil kvadrataj kilometroj najbare al Albanio. (Konica, Kosturi, Filat, Margeliĉ, Parga ka) . Ili apartenas al ambaŭ eklezioj, ortodoksa kaj islama. Parto de tiu teritorio, nomata Ĉamerio, apud la Jonia Maro, estis loĝata plejmulte de islamiĝintaj albanoj. Dum la antifaŝista milito, ankaŭ ĉamoj batalis ĉebrate de grekoj. Kompreneble, estis inter ili ankaŭ kelkiuj kolaboracionistoj, samkiel tiaj estis eĉ mem la ĉefministro greka, pluraj grekaj generaloj kiel Napoleono Zervas, ka. Dume en Grekio

eksplodis civila milito inter komunistoj kaj monarkistoj. Ĉi lastaj, subtenataj de britoj, tute ne intervenis kiam ŝovinistaj militgrupoj komencis masakri la islamajn ĉamojn sendistinge, forbruligi tutajn familiojn inkluzive infanojn kaj maljunulojn, senkapigi aŭ simple mortigi ilin. Por eskapi tiajn teruraĵojn, ĉamoj amase forlasis siajn teroj, domojn, riĉaĵojn kaj rifuĝis en Albanio. Dume en Ĉamerio plurestis ortodoksaj albanaj ĉamoj (laŭ grekoj: ĉiu ortodoksulo estas greko- evidenta ridindaĵo kaj absurdaĵo) .

Ĝuste la posteuloj de tiuj kelkdek miloj da islamaj ĉamoj albanoj, loĝantaj nun en Albanio postulas ke la greka registaro permesu ilin reveni en siajn terojn, kiuj estas el la plej fertilaj kaj belaj en Grekio.

La tria grupo, sufiĉe granda (kelkcentmila) , konsistigas el la albanaj enmigrintoj ekde la jaro 1990. Ili jam loĝas kaj laboras en Grekio, parte akiris la grekan civitanecon. Ĉirkaŭ 6000 beboj naskiĝas ĉiujare inter ĉi tiuj albanoj. Sed bedaŭrinde, ili ankoraŭ ne havas la eblecon eklerni ankaŭla albanan en la lernejoj, kvankam kelkaj volontulaj instruistoj albanaj tie. dum sabatoj aŭ dimanĉoj instruas al ili la albanan alfabeton, historion kaj kulturon, kaj tio nur al, ni diru, kelkdekoj da gelernantoj!

Dume en suda Albanio loĝas kompakte certa greklingva komunumo, (kelkdek miloj) kiu ĝuas ĉiujn rajtojn. Eĉ dum la reĝlanda tempo al ili ne mankis la greklingvaj lernejoj. La ŝtato aplikas por ili la tiel nomatan pozitivan diskriminacion: t. e, se en unu klasĉambro normala devas esti almenaŭ 20 lernantoj por difini unu instruiston, por grekoj la limo povas estis eĉ 2! Kaj simile.

La albana registaro postulas ke Grekio apliku al albanoj en Grekio almenaŭ la saman standardon!

Bardhyl Selimi

- Edmond Ludwig

Same mi deziras al vi kaj via familio ĉion bonan por 2017. Vi daŭre ĝuu oftan kunestadon kun viaj genepoj en varmaj lokoj de la mondo.

Ĉe ni malvarmas ekde 2 semajnoj en la valo, ĝis $-7C^{\circ}$. Sur la elzasa ebenaĵo estas nebulo, sed feliĉe, dumtage, en nia valo brilas suno kaj ĉiutage ni piediras dum unu ĝis du horoj en la suna montaro, kie ni ĝuis ĝis 9 gradojn. Belega panoramo, suna vetero.

Krom tio: forpasis pluraj gekonatoj, eĉ eksaj gelernantoj, kaj tio malĝojigis la etoson dum Kristnasko.

Nin vizitis nia filino dum kelkaj tagoj. Ŝi decidis ankoraŭ resti dum kelkaj jaroj en Parizo.

La 10-an de decembro Michel Basso kaj mi organizis la Zamenhoffeston de Mulhouse-Esperanto en nia regiono. Ege interesis la 24-kapan trilandan ĉeestantaron la vizito de la Domo SCHWEITZER, la ĝangala doktoro, kiu ankaŭ estis fama pastoro, teologo, profesoro, orgenisto, fakulo pri J?S. BACH kaj filozofa, Noberlpremiito pri paco. John KENNEDY konsultis Albert

SCHWEITZER okaze de la instalado de nukleaj raketoj en Kubo fare de Sovetunio.

La gvidisto tiel interese prelegis dum pli ol unu horo, ke mi devis interrompi la prezentadon, ĉar ni havis alin rendevuon. Tamen la samideanoj pludemandadis kaj aĉetis librojn!!!

Mi aldonas al ĉi tiu mesaĝo du tradukojn miajn kaj dokumenton pri la domo en Vieno, kie loĝis du famuloj: Ludwik Lejzer ZAMENHOF kaj Albert SCHWEITZER!!! Kia hazardo. Eĉ se mi nenie trovis iun ajn aludon de Schweitzer al Esperanto.

Nun mi daŭre preparas prelegojn kaj ĉiĉeronadon por la IFEF-kongreso en Colmar dum majo.

Fartu bone, vi, via edzino kaj via patrino!

Korajn salutojn de Edmond kaj Henriette

- Dankon, kara! Feliĉan Novjaron kaj ĉion bonan en 2017.

Ĝis :) :)

David Curtis

- Saluton,
Mi ankaŭ ege ĝojas ricevi vian mesaĝon! Mia Urbo nomiĝas Lomeo kiu estas la ĉefurbo de Togolandano. En Togolando la plej granda parto vivas per \$1 tage, multaj junaj forlasas Universitato pro manko da mono. Ni havas la plej bela flughaveno en la oksidenta parto de Afriko, tre granfa ŝiphaveno sed nur kelkaj profitas el ĝi.
Mi ege suferis kiam mi estis en liceo (gimnazio, high school) ĉar mi ne javis helpon de esperantistoj mi laboris unu jaron por subteni la venontan lernjaron. Sed mi ĉiam sukcesas.
Post la gimnazio, mi ankoraŭ ege suferas du jaroj, ĉar mi ne studis dum tiujn jarojn. Sed dank al Dio mi renkontis iun Franculon nomiĝas Jean pierre Marcq esperantisto. Li vizitis Togolando kaj deziras helpi min. Mi do redaŭrigis la studojn en angla.

- Dankon, Bardhyl, pro viaj bondeziroj, kiujn mi kore reciprokas.

Chio iru glate por vi, dum la Nova Jaro, kaj plue.

Mi tre shatas la okazon tralegi kelkajn el la rakontoj de via samlandano, Adil Olluri.

Amike,

David.

-
- Kara,

mi dankas la senditan libron kaj ja distingon ekesti inter la amikoj de la Albana Asocio. Vi, kara amiko, kaj la anoj de la Asocio bv konsideri min via reprezentanto en Brazilo.

Pri mia laboro en la universitato, kien mi eniris per konkurso en 1986, mi oportune detaligos. Tie mi estas kuratoro de la kolekto de libroj en Esperanto (parte disponebla per reto), esploras pri la semiotika rilato inter literaturo kaj pentroarto (mi estas ankaŭ pentristo), instruas en la licenciiga (pri portugala literaturo), magistriga kaj doktora kursoj (pri literatura semiotiko). Nuntempe mi finas mian postdoktoran esploro pri la verko de José Saramago (la ideologia funkcio sub la semiotiko de la vidado).

Bone jam estas tempo foliumi la literaturan donacon de vi ĝentile sendita, ĉu ne?

Altestime kaj amike,

Jozefo

(**Noto:** S-ro Jose estas unu el 13 volontulaj provlegantoj por la poezia volumo de la verkisto Sali Bashota, eldonota baldaŭ.)

Mo

- **Andres Kuenzli**

JUBILEOJ EN 2017: Krom Zamenhof, en 2017 okazos minimume du aliaj grandaj jubileoj, 500-jariĝo de la Luther-reformacio - 100-jariĝo de la Rusia Revolucio

Krom tio, okazos naskiĝtagaj jubileoj de John F. Kennedy, Indira Gandhi, Maria Theresia, Theodor Storm, Heinrich Böll k. a. (vd. <https://de.wikipedia.org/wiki/2017>)

Tiuj jubileoj certe metos la Zamenhof-jubileon, kiun esence renkontos nur esperantistoj, en sian ombron. Ĉar mi mem estos plene okupata pri tiuj du unuaj supre menciitaj jubileoj, mankos al mi tempo okupiĝi pri Zamenhof. Mi ankaŭ ne vidas veran kialon por denove okupiĝi pri li, krom pri la tempo en kiu li vivis, kio estas multe pli interesa temo.

aK, www.planlingvoj.ch

Mi iom korespondis (aŭ provis korespondi) kn Jefim Zajdman - la rezulto estas, ke mi devis konstati, ke temas pri eksterordinare malagrabra persono.

Kompreneble, lia elekto kiel Rusia e-isto de la jaro estas pura provoko de la kaculoj en Moskvo, laŭ putinisma filozofio, kiun REU plene aprobas.

Laŭ mi oni devus eksigi REU el UEA, ĉar ĝi ne respektas internaciajn normojn.

- **Petr Chrdle**

Kara,

bedaŭrinde pri Miloš Lukáš mi scian nenion pli ol estas en [Vikipedio](#). Se temas pri kopirajto, ankaŭ tiukaze mi ne povas helpi. Mi eĉ ne scias, ĉu li havis infanojn. Kompreneble mi ne havas rajton konsili, sed se temas pri aperigo de iu lia poeziaĵo, antaŭparolo aŭ ajna mallonga teksto, mi ne demandus kaj eldonus ĝin, des pli se en periodaĵo. La probable, ke tion ekscios liaj eventualaj heredantoj kaj eĉ se jes, do ke ili postulus iun altan honorarion, estas preskaŭ nula. Kompreneble mi devas lasi tiun " preskaŭ " ĉar hazardoj estas iam nekredablaj, tial estas vi, kiu devas decidiĝi prie.

Mi ĵus danke al vi tralegis la menciitan vikipedian tekston pri li kaj demetas la ĉapon. MI sciis, ke li tradukadis el antikaj lingvoj, sed ne sciis (aŭ se mi iam aŭdis aŭ legis tion do ne rememoris) ke li tradukadis ankaŭ el la albana kaj soraba kaj pluraj aliaj lingvoj!

Amikajn salutojn al vi kaj per kopio al Miroslav sendas, Petro

Dne 18. 1. 2017 v 20:20 Miroslav Malovec napsal (a) :

Artikoloj

- Lingvistiko
Perkolora prezentado de la interrilatoj esprimataj per komercaj verboj
Fabrizio A. Pennacchietti
La tuta teksto longas 71 paĝoj, jen unua parto

fabrizio. a. pennacchietti@gmail. com

www. fapennacchietti. it

2016

Tiu ĉi projekciado intencas prezenti, pere de laŭcele koloritaj bildoj kaj de diagramoj al ili respondaj, la semantikajn rilatojn kiuj ligas inter si diversajn primerkatajn verbojn

kiel *doni, ricevi, interŝanĝi, vendi, aĉeti, komerci, elspezi, enspezi, kosti, valori, valoregali* ktp.

La celo estas pruvi kiel tiaj verboj kunpartigas la saman konceptan matricon: nome homo ofertas varon kaj samtempe alia homo proponas al li samvaloran varon aŭ monon.

Samtempe tiu ĉi projekciado intencas prezenti alternativan modelon de la profunda strukturo de la frazo.

3

Tiu ĉi prezentado baziĝas sur tri principoj

UNUA PRINCIPO

Silvio Ceccato (1914-1997) 1961

Ernst von Glasersfeld (1917-2010) 1970

Ĉiu substantiva aŭ verba konstituanto de parolado rilatas kun la aliaj konstituantoj pere de arboforma strukturo formita de almenaŭ unu binara interrilato.


Ĉiu binara interrilato konsistas siavice el

(1) unua rilataĵo

(2) rilatilo

(3) dua rilataĵo.

La frontaj planoj simbolas la du rilataĵojn (nome substantivo, adjektivo, verbo, adverbo ktp), dum la oblikva plano simbolas la rilatilon (prepozicion ktp).



4



DUA PRINCIPO

Ronald W. Langacker 1986

Laŭ la dinamiko de la vida perceptado teoriigita de la Gestalt-a psikologio, la unua rilataĵo koincidas kun la fokusigita elemento kaj konsistigas la tiel nomatan **FIGURON** (*trajector*), dum la dua rilataĵo, ne fokusigita, konsistigas ĝian tiel nomatan **FONON** (*landmark*)


En la unua bildo la maldekstra rilataĵo (I) estas la **FIGURO**, nome la elemento aperanta sur la unua plano (flave markita), dum la dekstra rilataĵo (II) formas ĝian **FONON**.

Male, en la dua bildo la **FIGURO** estas la dekstra rilataĵo (I), aperanta sur la unua plano (flave markita), dum la maldekstra rilataĵo (II) estas ĝia **FONO**.




TRIA PRINCIPO*Viggo Brøndal (1887-1942) 1940*

Inter **FIGURO** kaj **FONO** ekestas kvar
ĉefaj tipoj de interrilatoj




La flava **triangulo** centre de la disko simbolas la **FIGURON**,
dum la ruĝa, rozkolora, blua aŭ lazura **kvadrantoj** de la
disko simbolas la **FONON**




7


Kiam la flava *triangulo*
trafas
la rozkoloran aŭ la ruĝan *kvadranton*
ekestas **APLIKA** interrilato



Kiam male la *flava triangulo*
resaltas
el de la *lazura* aŭ de la *blua kvadranto*
ekestas **RETROAPLIKA** interrilato



La **rilatiloj** (prepozicioj, kazaj finaĵoj ktp.) kiuj signalas la ekeston de **aplika** aŭ de **retroaplika** interrilato aperas en apartaj kestoj (vidu venontan bildon)



4 kestoj por rilatiloj



-	+	:	x
JE	EN	DE	KUN
AL	DUM	EL	PER
ĈE	SUR	PRO	LAŬ
ĜIS	POR	DA	APUD
POR	TRA	PRI	
.....
kiel		ol	kaj
<i>Adverbo (-E)</i> <i>Predikativo (Ø)</i> <i>-N</i>	<i>Subjekto-Verbo</i>	<i>Adjektivo (-A)</i> <i>Genitivo (-ES)</i> <i>Rilativo (KIU-)</i>	

La interrilato kiu ekestas inter
FIGURO kaj **FONO**
 povas esti *dimensia* (vidu + kaj ×)
 aŭ *sendimensia* (vidu – kaj :)



-	+	:	×
JE	EN	DE	KUN
AL	DUM	EL	PER
ĈE	SUR	PRO	LAŬ
ĜIS	POR	DA	APUD
POR	TRA	PRI	
.....
kiel		ol	kaj
<i>Adverbo (-E)</i> <i>Predikativo (Ø)</i> <i>-N</i>	<i>Subjekto-Verbo</i>	<i>Adjektivo (-A)</i> <i>Genitivo (-ES)</i> <i>Rilativo (KIU-)</i> .	

La interrilato estas *dimensia* kiam **FIGURO**
 (la *flava triangulo*) kaj **FONO** troviĝas
 en la sama tempo-spaca sfero.
 Vidu la *ruĝan* (+) kaj la *bluan* (×) kestojn



-	+	:	×
JE	EN	DE	KUN
AL	DUM	EL	PER
ĈE	SUR	PRO	LAŬ
ĜIS	POR	DA	APUD
POR	TRA	PRI	
.....
kiel		ol	kaj
<i>Adverbo (-E)</i> <i>Predikativo (Ø)</i> <i>-N</i>	<i>Subjekto-Verbo</i>	<i>Adjektivo (-A)</i> <i>Genitivo (-ES)</i> <i>Rilativo (KIU-)</i>	

La interrilato estas *dimensia* kiam **FIGURO**
(la *flava triangulo*) kaj **FONO** troviĝas
en la sama tempo-spaca sfero.
Vidu la *ruĝan* (+) kaj la *bluan* (×) kestojn



-	+	:	×
JE	EN	DE	KUN
AL	DUM	EL	PER
ĈE	SUR	PRO	LAŬ
ĜIS	POR	DA	APUD
POR	TRA	PRI	
.....
kiel		ol	kaj
<i>Adverbo (-E)</i> <i>Predikativo (∅)</i> <i>-N</i>	<i>Subjekto-Verbo</i>	<i>Adjektivo (-A)</i> <i>Genitivo (-ES)</i> <i>Rilativo (KIU-)</i>	

- Lingvistiko

SE VI SEKVOS NIAJN JENAJN KONSILAJN, VIA MANIERO PAROLI ESPERANTON TRE BALDAŬ ESTOS MULTE PLI FLUA, KLARA KAJ BELSONA:

TRE EFIKA MANIERO PLIAKRIGI ONIAN ATENTON cele al pli bona lernado per ĉi tiuj podkasto, estas aŭskulti ilin grupe, aŭ samtempe kune kun aliaj samideanoj, kaj provi poste esprimi al la kunaŭskultantoj la komprenitajn ideojn per siaj propraj vortoj, kaj helpi unuj la aliajn rilate la ĵus aŭditajn novajn vortojn kaj dirmanierojn. Krome, ĉar, laŭ nia sperto, tre viglaj diskut-sesioj pri rilataj temoj rezultas ofte el tia grupa aŭskultado, ni rekomendas ilin kiel tre bonajn deirpunktojn por neforgeseblaj konversacioj. Jen aktiveco aparte konsilinda por niaj ĉiusemajnaj esperantaj kunvenoj kaj kluboj.

SE VI DEZIRAS DISVOLVI BONAJN ESPERANTAJN PRONONCON,
AŬDKOMPRENIVON, KAJ PAROLFLUECON, ni konsilas al vi aŭdi ĉiujn niajn rakontojn,
artikolojn kaj legaĵojn kiel eble peĵ ofte, ne nur unufoje, sed PLURFOJE.

Eksperimentu per la ofta aŭskultado de ĉiu el ili kaj tre baldaŭ vi ne povos ne miri pri la evidenta, kontentiga kaj kvazaŭmagia efiko de tiaj ekzercoj sur vian propran Esperanton. Krome,

tute neatendinte, vi rimarkos ankaŭ, ke vi iom post iom akiris LA MALOFTE TROVEBLAN KAPABLON PENSI EN ESPERANTO.

Jen la ligilo al ĉiuj niaj Esperantaj registraĵoj por ke vi elektu kaj eksperimentu laŭ via plaĉo:

<https://soundcloud.com/luis-jorge-santos-morales>

FELIĈAJN EKSPERIMENTADON KAJ PLIRIĈIGADON DE VIA ESPERANTO.

(Bv. ankaŭ diskonigi la ekziston de ĉi tiuj podkastoĵoj inter viaj geamikoj kaj lernantoĵoj. Ili treege dankos al vi pro tio) .

- **Antaŭvidoĵoj de profesoro Hawking**

„Al i m o n d a j civilizacioĵoj povas estigi mortigan d a n ĝ e r o n por la tero: ĉe ilia alveno ni estos tiaĵ, kiaĵ la amerikaj indiĝenoĵoj antaŭ la malkovro de Ameriko fare de Kristoforo Kolumbo " :

jen koncepto, kiun lastatempe esprimis la brita astrofizikisto, profesoro Stephen William Hawking. „La homaro ne respondu eventualajn eksterterajn signalojn. "

Registaroĵoj

Dum sia nova televida programo *La preferataĵoj de Stephen Hawking* la fizikisto konsilis, ke la homaro je la ricevo de eventuala alimondana signalo devas konduĵi kiel eble pleĵ zorge. Hawking cetere jam klarigis al landaj registaroĵoj, kiumaniere oni agu en la okazo, ke ni kontaktiĝos kun eblaj eksterteraj civilizacioĵoj, precipe tiuj, kiuj el teknologia vidpunkto povas esti pli avancintaj ol ni.

Serĉo

„Ja nepras atento, kiam ni respondas " , aldonas la profesoro, kiu paradas per intelekta kvociento de 160. La astrofizikisto, naskiĝinta antaŭ 74 jaroĵoj en la angla urbo Oksfordo, ja partoprenas la projekton *Breakthrough Listen*, kiu ĝuas la subtenon de la rusa entreprenisto Jurij Milner: tiu provizis grandan parton de la buĝeto (100 milionoj da dolaroj) por serĉi signalojn de inteligenta vivo en la universo.

Organizaĵo

Laŭ kelkaj spertuloĵoj, la homaro ne plu povas kaŝi sian propran ĉeeston al la eksterteruloĵoj. Douglas Vakoch, prezidanto de METI (*Messaging to Extra-Terrestrial Intelligence*) – scienca organizaĵo, kies celo estas la analizado de eksterteraj mesaĝoj – deklaris, ke pro la multaj radiaĵoj kaj televidaj signaloj ni jam fatale diskonigis nian ekziston.

Nifo-bildoj

Bildoj pri supozebla nifo orbitanta ĉirkaŭ la suno por elsuĉi energion estas pruvo de la ekzisto de ekstertera vivo: Ĉi tion opinias iuj nifo-amatoroj. La bildoj al kiuj ili aludas, estis registritaj de la kosma sondilo SOHO, kiu realtempe dissendas donitaĵojn pri la suna aktiveco al la tero. Fakuloĵoj de la usona kosmagentaĵo NASA respondis tamen al la raportintoĵoj, ke la imagita kosma ŝipo estas simple kosma rubaĵo aŭ rezulto de malalta bild-kvalito.

Juan Carlos Montero Medina

- **Konstanta Kristnasko kaj tutmonda renovigo**

Je la 10-a de decembro 2001 — tago, kiam oni celebras, ekde la jaro 1948, la akcepton, fare de la Ĝenerala Asembleo de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) , de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj — mi troviĝis en la urbo Bonaero, en Argentino. Estis frumatene. Tiam mi verkis dokumenton al la Legianoj de Bona Volo, kiun mi ŝatus kundividi kun vi ĉiuj:

Ni travivas nun la monaton de la Kristnasko de **Jesuo**, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatestro. Tamen, laŭ nia koncepto, la Kristnasko devus esti konstanta.

Tela: Carl Bloch



Kaj la Templo de Bona Volo, la Piramido de Lumaj Spiritoj, la Benataj Animoj, estas la dolĉa hejmo de la Homa kaj Spirita Familio. Ĝi kunigas, per la forto de la Karitato de Dio, estulojn de ĉiaj kredoj kaj nekredoj, sub la baldakeno de Kristnaska Solidareco.

Felipe Moreno/Thiago Bianchi



Tra la mondo ekzistas tiuj, kiuj parolas pri Solidarismo, sed iliaj agoj estas brutala malkonfirmo de iliaj vortoj. Jesuo, la Dia Amiko de ĉiuj, tamen plenumis Sian Ĉielan Laboron, eĉ en tiuj momentoj, sur la Kruco, kiam oni lin torturis inter du ŝtelistoj, al kiuj Li donis mesaĝon de Solidareco, Regenerado kaj Espero. Li prilumis la socian kunvivadon per predikoj kaj ekzemplodonado, kiuj ĝis nun ne estis ankoraŭ plene komprenataj, flanke de multaj homoj, kiuj supozas, ke ili regas la mondon. Uzante la plej profundan signifon de Religio, Jesuo daŭre plenumis la Dian Servon ekvilibrigi mensojn kaj korojn. Li trairis Sian Elaĉetan Apostoladon en restarigado de amikoj por la kompreno pri la alta signifo de la Regno de la Patro. Li parolis al ĉiuj, kiuj emis lin aŭskulti, por realigi la subliman semadon. Ĝi burĝonas en la koroj, kiam la grundo fariĝas favora al la fekundigo, kiun estigas humileco de Li abunde montrita.

Renovigi la destinton

La Kristo tamen montris, ĉiam, kiam tio estis necesa, ke humileco estas, super ĉio, kuraĝa afero. Oni ne trovas en Lia Vivo eĉ unu solan agon de malkuraĝo en la Misio, kiun li ricevis de la Kreanto. Lia modelo estas tiu de kuraĝo. Tial Li renaskiĝis por plu instrui kaj solidare helpi.

Liajn agojn kronis Lia obstino. Lia Aganta Fido kaŭzis renovigon en la mondo, kun la fundamento de Frateco inter Liaj disĉiploj. Li predikis la unuiĝon per Frata Amo de Sia Nova Ordono ([Evangelio laŭ Johano, 13:34 kaj 35; 15:7, 8, 10 ĝis 17 kaj 9](#)). Liaj konstantaj Pacienco kaj Laborado, dum jarcentoj, daŭre vekas Animojn, kiel sankta altaro de preĝado, eĉ se Lia penado kaŭzis al Li sangajn larmojn.

Lia Ĉeesto nin fortigas. Lia Grandanimeco konservas nin vivantaj. Lia Mizerikordo nin subtenas. Al Li, la Ĉiela Liberiganto, ni ŝuldas la nevenkeblan decidon obstini ĉiam sur la ĝusta vojo, eĉ dum plej teruraj tempestoj. Li staras sur la barko. Plie: Li staras antaŭ la rudro, kaj Li donas " *al Cezaro la proprajon de Cezaro, kaj al Dio la proprajon de Dio* " (Bona Mesaĝo laŭ **Mateo**, 22:21) .

Li nur petas de ni konstantecon en Aganta, Diiga Fido, kiu formovas montojn. Kaj Li tion konfirmis, kiam li promesis, ke " *Li estos kun ni ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo* " (Evangelio laŭ Mateo, 28:20) . Por tio Li senĉese blovas al nia Spirito novan vivon. Efektive, ĉiu tago estas tago por renovigo de nia destino.

Ni iru kun Li, unuiĝinte, solidare. Ni bataladu Liaflanke. Kaj la venko, post superado de ĉiaj kaptiloj de malbono, estos nia. Kiu fidis pri Jesuo ne forperdas sian tempon, ĉar Li estas la Granda Amiko, kiu ne forlasas amikon survoje.

La Paco de Dio estu nun kaj ĉiam en viaj koroj, vi herooj de la Dia Bona Volo! Kun Jesuo ni venkos ĉiam, ĉiam, ĉiam!

José de Paiva Netto

- **Albert SCHWEITZER (1875 – 1965)**

Albert SCHWEITZER naskiĝis la 14-n de januaro 1875 en Kaysersberg. Kiam li aĝis 6 monatojn, lia familio ekloĝis en Gunsbach, kie li vizitis la vilaĝan lernejon. Lia patro Louis SCHWEITZER oficis kiel pastro en Gunsbach dum 50 jaroj. Li verkis detalan taglibron dum la tuta daŭro de la Unua Mondmilito.

Albert ŝatis kantadi kaj aŭskulti la orgenan muzikon, li ankaŭ tre bone konis rakontojn bibliajn. Okjaraĝa li ricevis la Novan Testamenton. Samjare li travivis incidenton, kiu lin ege perturbis: iun dimanĉan matenon lia kamarado Henri proponis al li ĉasi birdojn per ŝtonĵetilo. Li ne kuraĝis lin kontraŭi kaj kiam li estis ekpafinta al birdo, eksonoris la preĝejaj sonoriloj, kiuj anoncis la paskan diservon. Tiam li ekmemoris la dian ordonon: " Vi ne mortigu! ". Ekde ĉi tago li komprenis la sanktecon de ĉiaestafa vivo.

Post la elementa lernejo li vizitis dum unu jaro la liceon de Munster, kien li ĉiutage piediris. Poste li ekloĝis ĉe onklo en Mulhouse, kie li pluvizitis liceon kaj trapasis la bakalaŭran ekzamenon en 1893.

Dekokjaraĝa li ekstudis teologion kaj filozofion en la Universitato de Strasburgo kaj iĝis profesoro en la sama universitato. Li specialiĝis en la vivoj de Jesuo kaj de la apostolo Paŭlo.

Paralele li iĝis lerta muzikisto. Li eklernis pianludadon, kiam li aĝis kvin jarojn kaj li okjaris, kiam li ludis per la orgeno de Gunsbach. Li iĝis fakulo pri Johann Sebastian BACH kaj tre rapide internacie famiĝis kiel orgenisto. Li ankaŭ fake konsiladis orgenfabrikistojn.

Ĉar li mem travivis feliĉan infanaĝon, li decidis en 1905 studi medicinon por labori en ekvatoria Afriko je la dispono de la tieaj malfeliĉuloj. Ĉi studojn li finis en 1912.

La 18-an de julio 1912 li edziĝis kun Helene BRESLAU.

La 26-an de marto 1913 li enŝipiĝis al Lambaréné, en Gabono, kiu tiam estis franca kolonio. Tie li ekflegis la homojn kaj ekkonstruis eĉ propramane sian hospitalon.

Ĉiufoje kiam li revenis al Eŭropo li koncerte turneis por kolekti monon cele al grandigo de sia hospitalo kaj plibonigo de la sanigado.

Kiel germana civitano – tiam Elzaso kaj Loreno apartenis al la Dua Germana Imperio - li estis devige revenigita al Francio, kie li estis internigita en laborkampo en sudokcidenta Francio. Tie li kompreneble flegis siajn malliberigitajn samsortanojn.

La 14-an de januaro 1919 naskiĝis lia filino Rhena.

En 1928 la urbo Frankfurto enmanigis al li la premion Goethe. Tiam li konstruigis domon en Gunsbach, kiu iĝis nun la Muzeo SCHWEITZER.

En 1953 li obtenis la Nobelpremion pri Paco. Per ĉi mono li modernigis la hospitalan vilaĝon de la lepruloj.

En 1958 li lanĉis alvokon kontraŭ la atombombaj eksperimentoj.

En 1959 li entreprenis sian 14-an kaj lastan vojaĝon al Lambarene. Tie li forpasis dum sia 90-a jaro, la 4-an de septembro 1965. Li ripozas apud sia edzino kaj sia filino.

Lia tuta vivo disvolviĝis ĉirkaŭ lia fundamenta kredo: la respekto al la vivo. Albert SCHWEITZER (1875 – 1965)

Kiel naskiĝis la koncepto de respekto al la vivo ĉe Albert SCHWEITZER -

Eta resuma prezento

La Unua Mondmilito ĉesigis la promesplenan agadon de Albert SCHWEITZER en la ĵus ekkreiĝinta gabona ĝangala hospitalo de Lambaréré. Ĉar Elzaso tiam apartenis al la Dua Germana Imperio, Albert SCHWEITZER estis konsiderata malamika eksterlandano. Unue li rajtis plulabori sub daŭra gardado. Poste ĉian ajn laboron oni malpermesis al li. La tiam neatendita libera tempo donis al li la okazon cerbumi pri problemo, kiu lin de longe okupis: la milito signifis por li antaŭsignon por perdiĝo de la civilizo. La agnosko de la malhoma konduto okaze de milito klare montris, ke la homoj rezignis je la deziro agadi por justa konduto de la individuo kaj por vera homa socio. Jen kio devus esti civilizo.

„Kiam sciiĝis, ke inter la blankuloj, kiuj antaŭmilite vivis borde de la rivero Ogowe, dek jam pereis, unu inter la tiel nomataj „sovaĝuloj ” deklaris: 'Se la triboj ne kunvenas por preparoli la aferon, kiel ili povas pagi ĉiujn ĉi mortintojn?'

Schweitzer diris: " Jam dum miaj unuaj universitataj jaroj mi komencis dubi, ĉu la homaro vere suriras vojon al progreso. Dum tiom da okazaĵoj mi estis devigata konstati, ke la publika opinio ne nur ne rifuzis kun indigno publike deklaritajn malhumanajn opiniojn, sed ilin eĉ aprobis. Nun la milito furiozis pro rezulto de la dekadenco de la civilizo. "

Konsciante ke plendi pro la dekadenco de la civilizo ne utilas, Schweitzer serĉadis novajn vojojn por progresigi la civilizon. Tiel iĝis klare por li, ke la civilizo estas ege ligata al ia vivkoncepto. Nur kiu jesas je la vivo kaj la mondo, ankaŭ kapablos krei civilizon. La jeso je la vivo kaj je la mondo necesigas etikon, t. e. justan respondecan agadon. Etiko estas la klopodo al atingo de la idealo de la boneco.

Li deklaris: " Tiam mi ekserĉis la konojn kaj la konvinkojn kiuj estis je la origino de la deziro de emo al civilizo kaj la kapablo ĝin realigi. Unu inter la plej klaraj signoj de la degenerado de la civilizo estas ke la antaŭe proskribita superstiĉo denove akcepteblas fare de la socio. Kio do estas civilizo? La esenco de la civilizo estas la universala deziro de progreso, kiu konscias, ke etiko estas ties plej grava valoro. Sed kia estas la vivkoncepto, en kiu kaj la universala kaj la etika deziro de progreso estas **pravigeblaj** kaj kunigeblaj? Ĝi konsistas en etika mond- kaj vivkoncepto. "

Vane Albert SCHWEITZER serĉis dum monatoj respondon al la demando, kiel homo kapablos jesi je si mem kaj je la mondo. En septembro 1915 li entreprenis longan vojaĝon sur la rivero. Dum la vespero de la tria tago li subite trovis la esprimon „Respekto al la vivo " . Kiu cerbumas pri la mondo kaj pri si mem, rimarkas, ke ĉio kio lin/ŝin ĉirkaŭas, plantoj, bestoj, homoj, same deziregas vivi. Kiu komprenas tion, estas devigata ilin ami. Pro respekto al Dio, kiu donacis la vivon al ĉiu estaĵo, por ke ĝi povu realigi sian devon, necesas respekti ĉiun, por ke tiu ĉi povu ĉi-cele pluvivi. Jen la ĝusta konduto por ĉiu ajn kreita homo. Kiu tion faras, agadas kun bono.

„Kio estas respekto al la vivo, kaj kiel ĝi naskiĝas en ni? 'La plej trafa esprimo de la homa

konscio jenas: 'Mi estas vivo, kiu deziras vivi, enmeze de vivo, kiu deziras vivi'. Kiel vivdeziro enmeze de vivdeziro, homo sin difinas ĉiufoje, kiam li cerbumas pri si mem kaj pri la mondo ĉirkaŭa. Samtempe la homo iĝinta pensanta homo spertas la devigon aliri ĉies vivdeziron kun la sama respekto al la vivo kiel la propran vivdeziron. Li spertas alies vivon en sia propra vivo. Bona li konsideras la konservadon de la vivo, la promociadon de la vivo, la levadon de evoluigebla vivo al sia plej alta valoro; malbona li konsideras la detruadon de la vivo, la damaĝadon de la vivo, la minorigadon de evoluigebla vivo,,. Jen la absoluta fonda principo de la moralo necesa al ĉia ajn pensado. " „La homo pensas etike nur, kiam li konsideras sankta la vivon kiel tia, la vivon de planto kaj de besto, kiel de homo, kaj kiam li helpas al ĉia vivo troviĝanta en danĝero. Nur la universala etiko de la sperto de senlime vastigita respondeco pri ĉio vivanta estas pravigebla en la pensado. " La etiko de la respekto al la vivo do entenas ĉion, kio estas difinebla kiel amo, sindono, kompato, kunĝojado kaj kunstrebad.

Enesperantigis Edmond Ludwig

- **Albin Kurti, deputito de Kosovo**



La dividita urbo de Mitrovico

Kosovo havas du ĉefajn problemojn. La unua estas la divido de la urbo de Mitrovica kaj la dua estas la troa senlaboreco. Preskaŭ ĉiu alia problemo povus derivi de ĉi tiuj du. Do, la unua problemo estas la divido de la urbo de Mitrovica.

La ĝisnuna dialogo kun Serbio, pri la tiel nomata normaligo de la interrilatoj, fakte estas malnormaliginta Kosovo-n. Ekde la subnoto¹ en la nomumo de la ŝtato ĝis la maskiga algluaĵo sur la numerplatoj de la aŭtoj. Dume, koncerne la muron², oni ne povas diri ke ĝi dividis Mitrovico-n, sed ĝi estas tie por pli malebligi la unuiĝon. La divido okazis pli frue.

Meze de junio 1999 okazis la fizika divido per la ponto, kuniganta ambaŭ la bordojn de la rivero Ibër. En sia libro " La Pacbatalantoj " , la tiama ĉefadministranto de Kosovo, Bernard Kushner skribis, mi citas fragmenton: " La francaj kolonoj, komisiitaj por tiu areo, dum la eniro de aliancanoj je la 12-an de junio 1999, establigante la kampadon sude de la urbo, ne persekvadis la policon de Belgrado, sed haltis sur la

¹ Temas pri Kosovo sub rezolucio 1244 de UNO

² Temas pri muro konstruita lastatempe tuj trans la ponto

ponto, enigante rare iun observunuon pli norden, kie ili malkovris membrojn de la polico kaj murdistojn portantaj la skalpojn kaj virinan hararon de albaninoj, pendigitaj sur la ĉeneroj de siaj zonoj. Laŭ kies ordono haltis niaj liberigantaj fortoj ĉe la ponto " - demandas Bernard Kushner. " Neniam mi eksciis precize tion, sed tio estis granda politika eraro. Tiu subita halto, ne nur igis Mitrovico-m dividita urbo, sed ankaŭ kaŭzis amasan eksodon, reciprokan kaj ĉiamtempan persekvadon de mutiĝaj rifuĝintoj senigitaj de ĉio kaj ofertis al serboj neatenditan rifuĝan teritorion ĉe borde de Serbio, kio ankoraŭ gvidiĝis de Miloxeviĉo. Baldaŭ, la serbaj volontuloj organizis, norde de la ponto, policon gviditan majstrece de Oliver Ivanoviĉ, plifrua profesia sportisto. Kiel kuraĝa politika homo, li fariĝis por UNMIK³ malfacila kunlaboranto kaj same sincera, kiom povas esti la homo en tiuj cirkonstancoj.



Li organizis armitan unuon de la pontogradistoj, armitaj homoj de ĉiuj tendencoj, ekde la plej fia homoj, plej brutalaj, ĝis la plej sindonemaj patriotoj, kies ĝenerala stabo estis en " Dolce Vita " fronte de la ponto, kie ili notis la liberan serban teritorion kaj kiuj, per komuniĝo per radio povus ariĝi tuj post la unua alarmo " (finiĝas la citato) . Kaj pli poste, daŭrigas Bernard Kushner en la sama libro: " sed la franca komandanto de la areo kontraŭis niajn moviĝojn endanĝerigintaj la serban aŭtonomecon en la supra parto de la urbo de Mitrovico. " Do, mem la eksa ĉefadministranto de UNMIK, Bernard Kushner, plendas al sia sampatrujano, franca generalo, kiu ne permesis ke oni iru pli profunden, norde de Ibër. Do, kiam kelkaj diras ke ili skribas leterojn al EU, diras tion aŭ ĉi tion al KFOR⁴, estas mem Bernard Kushner kiu rakontas ke ili ne estas senkulpaj je tiu ĉi aspekto. Do, ni estas proklaminta la sendependecon de nia ŝtato, la afero estas kion faros ni, se mem Bernard Kushner rakontas ke kulpas la franca KFOR tie.

³ UNO administracio en Kosovo

⁴ Armitaj fortoj de NATO instalitaj en Kosovo

Plue, antaŭmilitite, 53 % de la loĝejoj, norde de Mitrovico, estis de albanoj, laŭ raporto de Internacia Krizogrupo. Se ni aldonos al tio la fakton ke la albanaj familioj enhavas notinde pli da membroj ol tiuj serbaj, tiam evidentiĝas ke la dominanta plimulto de la loĝantaro tie estis albana. Do, kvankam Mitrovico estis dividita juniomeze 1999, plue norde de la urbo la plimulto konsistis el albanoj. Do, antaŭ la divido, albanoj estis plimulto. Sed, la nokton inter 3 kaj 4 februaro 2000, estis mortigitaj 11 albanoj kaj dekoj da aliaj estis mistraktitaj, lezigitaj aŭ vunditaj, dum 1564 familioj kun 11364 membroj estis forpelitaj. Ĉio tio okazis post la fino de la milito. Ĉiuj tiuj estis agnoskitaj kiel militviktimoj, ĉar tiel pli konvenis.

Okazis festoj en Prishtina, sed okazis teroro en Mitrovico. Dufoje Mitrovico travivis ĉagrenajn tagojn, dum en Prishtina oni festis, ankaŭ juniomeze, sed ankaŭ kiam oni proklamis la sendependecon de Kosovo, februaromeze 2008. Oni proklamis ion en Prishtina kaj trafis io malbona al Mitrovico kaj norde de Ibër. Tial estas ja du sinsekvaj fazoj, kiuj aliigis la nordon de Mitrovico, La unua estas la juniomezo 1999 kaj la dua februaromezo de 2000.

EULEX⁵, same kiel tiamtempe tiu de UNMIK, staras simple super la leĝo, dum la strukturoj de Serbio estas eksterleĝaj. Ĉi tie estas la esenco de la krima situacio tie. Ekzistas potenco super la leĝo kaj potenco eksterleĝa. EULEX - polico kaj KFOR ne respondecas pro disfaloj, dum la krimuloj ne puniĝas pro ilia sukceso, kompreneble pro krima sukceso. Estas sciite ke KFOR, plejmal multe senarmigas tie kie plej multe oni devas fari tion, norde de Mitrovico. Norde oni proklamis amnistion ankaŭ per la abrobo de la deputitoj de la plimulto en la parlamento, eĉ ne nur de la plimulto, bedaŭrinde, sed tio fariĝis sen anticipa senarmigo! Ne okazis senarmigo de la nordo antaŭ ol oni faru amnistion tie kaj oni liveris fonduson por la nordo sen iu ajn senarmigo. Kaj bone oni scias ke Kosovo transformiĝis de okupita teritorio fare de Serbio al teritorio administrata de UNMIK, nur post la senarmigo de UÇK⁶, do UÇK estas senarmigita, okazis senmilitariziĝo kaj antaŭenigo de la statuso de Kosovo, dume en la nordo de Kosovo neniam okazis senmilitariziĝo kaj senarmigo.

Sed Mitrovico ne estas nur politika afero. Iam ĝi estis la plej riĉa urbo de Kosovo, nun, dividita, ĝi estas transformita en la plej malriĉan urbon kaj la solan urbon en Kosovo, kies la loĝantaro reduktiĝis.

Ekde antaŭ dektri jaroj en sia raporto la Eŭropa Iniciato por Stabileco estas dirite ke norde de Mitrovico kaj en Zvečan oni vivas per 95 eŭroj monate, kies 60 % estas certigita de Belgrado kaj 23 % de Prishtina, dume sude de Mitrovico la homoj vivas per 37 eŭroj monate, el ĉiuj 37 % estas certigita de Registaro de Kosovo kaj 40% el privata sektoro. Imagu, ekde 13 jaroj averaĝe norde de Mitrovico oni vivis per 93 eŭroj monate, dum sude per 37 eŭroj monate. Laŭ enketilo de UNPD ekde la jaro 2010, sude de Mitrovico 47.2 % de la familioj havas enspezojn malpli ol 211 eŭroj monate, do preskaŭ la duono havas malpli ol

⁵ Internacia polico en Kosovo

⁶ Naciliberiga armeo de Kosovo

211 eŭroj monate, 40.5 % havas po 212- 500 eŭroj monate.

Do Mitrovico troviĝas en plej peza stato, estas la plej malriĉa urbo de Kosovo, malgraŭ siaj riĉaĵoj kaj la potencialo de Trepĉa⁷, krome la urbo kun la plej granda ponto restas dividita. Tamen, pro tio kulpas ne nur Serbio kaj franca KFOR el la jaro 1999, sed ankaŭ la albanaj politikistoj, aparte tiuj responsaj pri Mitrovico.

Nia propagando

- Zamenhof Tago

(Dita e Zamenhofit)

Dita e Zamenhofit dhe Dita e Librit në Esperanto, më 15 Dhjetor



Më 15 dhjetor është ditëlindja e L. L. Zamenhofit (1859-1917), e krijuesit të Esperantos- Gjuhës ndërkombëtare. Me nismën e njërit nga shkrimtarët më në zë që e përdorin Esperanton, Julio Baghy-t (1891-1967), 15 dhjetori u quajt Dita e Zamenhofit dhe Dita e Librit në Esperanto. Më 15 Dhjetor, folësit e Esperantos në mbarë botën e festojnë këtë ditë edhe si ditë të Kulturës së Esperantos. Për të rritur nivelin kulturor të esperantistëve, Baghy propozoi që Dita e Esperantos të jetë edhe Ditë e Librit në Esperanto.

Më 15 dhjetor, grupet vendore të esperantistëve në vende të ndryshme organizojnë seanca informimi për publikun mbi gjuhën ndërkombëtare, mbi letërsinë e saj

të bollshme, qoftë origjinale, qoftë të përkthyer. Kështu ata i tregojnë botës, se si lëvizja esperantiste i përhap veprat kulturore të etnive të ndryshme, duke mundësuar për folësit e gjuhëve të tjera shijimin e veprave të popujve të tjerë,

⁷ Granda ricxa ercejo de karaj mineraloj

duke e bartur ndryshimësinë gjuhësore nëpërmjet Esperantos.

Kjo është ndihmesa e tyre në Ditën e Zamenhofit dhe Ditës së Librit, në mbështetje të komunikimit të drejtë, të barabartë, që respekton ndryshimësinë gjuhësore dhe kulturore, që synon ruajtjen e qendrueshme të pasurive dhe të drejtave të tyre.

Përveç mbajtjes së mbledhjeve, ekspozitave dhe ligjëratave për nismëtarin e Gjuhës Ndërkombëtare, L. L. Zamenhofin, atë ditë, kultura e Esperantos, letërsia e Esperantos festohen ndër të tjera me paraqitjen e botimeve të reja, me shitjen e librave dhe leximin e një libri të ri. Ka vepra në gjuhë të ndryshme, që janë përkthyer nga origjinali në Esperanto, të tjera kanë dalë në gjuhët vendore, të përkthyer nga versioni në Esperanto por nga një origjinal në një gjuhë tjetër. Esperanto na lejon të sigurojmë një përkthim sa më besnik të teksteve, transmetimin e mendimeve, duke funksionuar si një gjuhë e drejtë urë ndërmjet dy gjuhëve etnike.



Kujdestarët për Informimin në UEA (Organizata Botërore e Esperantos)

El esperanto en la albanan lingvon tradukis: Bardhyl Selimi

Afishet: Peter OLIVER (grafika) dhe përkthyesit nga tërë bota. Realizimi me veprimtarinë e esperantistëve nga shumë vende nën udhëheqjen e skuadrës për informimin (ZPI de UEA). Falemnderit të gjithëve!

- Afîšo de brazilaj samideanoj

SOMOS MAIS QUE ONZE



NOVAS BELEZURAS/NOVAJ BELAĴOJ!

"ESPERANTO ESTAS C'IES PROPRAJ'O!"
"ESPERANTO É PATRIMÔNIO DE TODOS!" Zamenhof

162 BELAĴOJ / 162 BELEZURAS ■

E-ASOCIUJ KAJ KONGRESUJ ■

FAMAJ EMINENTULOJ ■

PLURAJ URBUJ / KTP

Associações e Congressos de Esperanto /

Vultos famosos / Várias cidades / ETC

BV. SENDI CŬ MESAĜON AL VIAJ KONTAKTOJ!

PF. ENVI EŜTA MENSAGEM A SEUS CONTATOS!

NEKREBLE

KOPILALO TUTMONDE LIBERIGATA!

BONEGI ESTAS 162 BELAĴOJ, KIUN TUTLIBERE VI RAITAS KOPII

EN VIA DATEN-PORTILO - PENDRIVE, GARDI ILIN KIEL


DIAMANTAN JUVELON, PRESI KAJ DIVENDI AL AMIKUJ KAJ
FAMILIANOJ POR HELPI LA KOFRON DE VIA SOCIOL.

#####

INACREDITÁVEL!

DIREITO A CŬPIA LIBERADO!

#####



**ŬTINCI SŬO 162 BELEZURAS, QUE VOCŬ LIVREMENTE TENI DIREITO A COPIAR NO SEU "PENDRIVE",
GUARDÁ-LAS COMO JOIA DE DIAMANTE, IMPRINIR E VENDER A AMIGOS E FAMILIARES PARA ABARROTAR O COFRE DE SUA
ASSOCIAŬO**

#####

- 50-jara jubileo de la " Esperanto-Parko " en Budapeŝto

NI LAVIS LA BARBON DE ZAMENHOF - KAJ ANKAŬ LA MEMORŬTONON

En la jaro 1966 okazis Universala Kongreso en Budapeŝto. Enkadre de ĝi estis inaŭgurita " Esperanto Parko " ĉe la piliero de la ponto Erzsébet, kiu estis trovebla dum longa tempo eĉ per tiu nomo sur la mapoj de la urbo. La tiama urbestro mem inaŭguris la Parkon, kie estis trovebla ankaŭ Esperanto-fontano kun ĉ. 5 metra diametro, iu memorŝtono kun alto 70 cm-oj, kaj statuo de Zamenhof.

La fontano jam antaŭlonge paneis, sed la **Esperanto-memorŝtono kaj la statuo** havas regulajn turistajn vizitantojn, kaj ankaŭ mi mem ofte haltadas ĉi tie dum urborigardaj ekskursoj kun esperantistaj grupoj.

Dum la la preterpasantaj jardekoj al la ŝtono kaj statuo algluiĝis amaso de polvo, malpuraĵo - kaj lastatempe ni jam hontis pro ilia aĉa aspekto antaŭ la eksterlandaj vizitantoj. Pro tio kun kelkaj volontuloj de la Fondaĵo Eszperantó ni decidis, ke ni alportos kelkajn viŝ-broŝojn, purigenzojn kaj akvon, kaj ni lavos la barbon de Zamenhof - kaj kompreneble la tutan statuon kaj ankaŭ la memorŝtonon.

Kelkaj fotoj pri la puriga kampanjo: <https://www.facebook.com/media/set/?set=a.984656868330334.1073741849.117145901748106&type=1&l=9dbe0c309d>


Sur la fotoj estas videble, **kia estis** kaj **kia iĝis** la memorŝtono post la puriga proceso. Ni sukcesis forigi 25-30 jaran malpuraĵon de la pasinta 50 jara historio, sed restis ankoraŭ 20 jaroj por la sekva printempo... :-)

Dankojn al la volontuloj de Fondaĵo Eszperantó en Hungario!

Szilvási László

Postskribo: Verŝajne ankaŭ en aliaj landoj ZEO-j kaj memorŝtonoj ĝojus pro ioma purigado.

•




El Brazilaj samideanoj

-



Portreto giganta de Zamenhof en Pollando





gresillon.org/teknika vortaro



Estu ni sentimaj, la triumfo apartenas al tiuj, kiuj plej kuraĝas.

(Charles Chaplin)

- *Brazilaj esperantistoj propagandas*

- Esperanto- kurso en Tajlando



- Esperantistoj el Tajvano



- *La Mesio en Esperanto: unika evento en la kultur-historio de Esperanto*

DONACO POR KRISTNASKO: MESIO DE HÄNDEL – EN ESPERANTO

La oratorio MESIO de Friedrich Händel estis prezentita en Esperanto la 29-an de marto en 1987 fare de la fama 100-membra neesperantista koruso de Centra Ensemblo de KISZ.

La koncerto estis parto de la neesperantista projekto "Budapeŝta Printempa Festivalo", kies direktoro Lengyel Márton estis esperantisto. La koncerto mem okazis en unu el la plej elegantaj urbocentraj koncertejoj "Vigadó" en Budapeŝto, kie la spektejo estis plenŝtopita de esperantistoj. Szilvási László prizorgis la sonregistradon de la koncerto, kiu estis eldonita tiam de lia entrepreno "Lingvo-Studio" en muzika [sonkasedo](#) kiel historia dokumento de nia esperantista kultur-historio.

La sonkasedo jam de multaj jaroj ne plu estas aĉetebla. Ĉi jare la eldonejo decidis liberigi la sondosierojn en la **originala kvalito** por libera uzo - do ili staras nun je via ĝuo kiel senpaga kristnaska donaco de la eldonejo.

Aŭskultu la koncerton ĉe: <http://www.eventoj.hu/mesio/>

Pri la "Projekto Mesio" Roberto Poort kompilis apartan retpaĝon ĉe lia Aŭd-Vida Studio ĉe <http://novajhoj.weebly.com/mesio-projekto.html>

-
- Muziko: Kamerorkestro de Hungara Ŝtata Koncertensemblo
 - Kanto: Universitata Koruso de Centra Ensemblo de KISZ
 - Solkantistoj: Verebics Ibolya (soprano), Pánczél Éva (aldo), Szilágyi Béla (baso), Márk László (tenoro)
 - Korusa estro: Hollerung Gábor
 - Arta gvidanto: Bohus Gábor
 - Tradukinto: Szabó Imre
 - Sonregistrado: Lingvo-Studio 1989, Szilvási László.



- **Maria Majerczak**

NOVA PARLAMENTA GRUPO en Pollando.

(REAGOJ priesperantaj necesaj.)

En unu el la plej grandaj informportaloj de Pollando, Interia, aperis artikolo „Parlamentanoj volas promocii la lingvon Esperanton " pri formiĝo en la pola Parlamento de nova, 13-persona Parlamenta Grupo, subtenanta E-on (post la balotado de 2015, sekve al la ŝanĝiĝo de la parlamenta dispozicio, la antaŭa grupo ĉesis ekzisti) . Temas pri objektiva informo de la oficiala landa informejo, la Pola Pres-Agentejo (PAP) , publikigita en la speciala, festa tempo: la duan Kristnaskan tagon, 26 dec. 2016.

Oni legas, ke la parlamentanoj volas helpi promociadon de la lingvo kaj konstruadon sur la ideo de Eo de internaciaj rilatoj, inkluzive de ekonomiaj, provi veki intereson de la Eduk-Ministerio pri instruado de la lingvo en lernejoj...

- **Afiŝo**



- **Revuoj esperantaj**

[Kontakto](#)

[Nacia Identeco - Kontakto 2016:5 en la reto!](#)

Posted: 21 Dec 2016 04:00 AM PST

Saluton!



Pasis nur kelkaj semajnoj de kiam la usona popolo elektis sian novan prezidanton. La tuta mondo miris kaj apenaŭ kredis ke la miliardulo Donald Trump, kun sia retoriko plena je antaŭjuĝoj kaj faŝismaj trajtoj, estas la elektito de la plejmulto de la usonanoj. Tamen ne estas sekreto ke ankaŭ en aliaj mondopartoj kreskas la fortoj de la naciismaj politikaj partioj. Ĝis kiam la (mis) konceptoj pri nacioj estos uzataj por apartigi homojn?

Trump promesis forpeli 11 milionojn da kontraŭleĝaj enmigrintoj kaj konstrui muron ĉe la landlimo kun Meksiko. Fronte al tio ni demandas: Kial ne eblas Amerika Unio? Jen ni prezentas kiel ĉefartikolon analizon de Carlos Hernández el Meksiko pri la temo. Ana Ribeiro el Brazilo esploras siajn originojn kaj revenas 100 jarojn en la familia historio, kiu migris el Portugalio al Brazilo. Fine pri la temo ni aldonas raporton el rifuĝejo en Irako, kie multaj fuĝas de la t. n. " Islama ŝtato "

En nia intervjuo rubriko malofte estas literaturistoj. Ja ekzistas en Esperantujo aliaj specifaj literaturaj revuoj, sed ni faras strebon inviti ankaŭ tiufakajn esperantistojn. Tiel, danke al nia kunlaboranto Paŭlo Silas, ni prezentas al vi intervjuon kun Gerrit Berveling, tradukisto, membro de la Akademio de Esperanto kaj pastoro en Nederlando.

Se paroli pri religio, la ĉefartikoloj de la numero 2016:3 (pri religio) venigis al nia redakcio novajn artikolojn kiel reagojn. Jen temo, kiu diversmaniere tuŝas la homojn kaj ili proponas du novajn perspektivojn pri la temo. Ni ankoraŭ havas ĉi-numere libro- kaj filmo-recenzojn, poemon kaj la kutimajn konstantajn rubrikojn.

Fine, mi petas permeson al vi por fari etan omaĝon al mia amata forpasinta fianĉino. Bruna forpasis la 19-an de novembro pro kancero en la aĝo 29, post 1 jaro kaj duono de la diagnozo. Ŝi trapasis tiun teruran tempon kun admirinda forto kaj ĉiam afable rilatis kun siaj proksimuloj. Aminda persono, profesie ŝi estis dentistino kaj talenta muzikanto. Ŝi multe interesiĝis pri

Esperanto kaj studis ĝin, sed pro troa timideco, ŝi timis paroli publike. Ni kune partoprenis la IJK-n kaj UK-n en 2014. Por la venonta numero ni ŝatus kolekti artikolojn rilate al sano. Se vi havas spertojn aŭ konojn pri (mal) sano, bv. dividi ilin kun ni.

La elŝutado de tiu ĉi numero eblas nur por abonantoj. Por elŝuti ĝin vi devas iri al la paĝo <http://reto.uea.org/>, ensaluti kaj poste elekti la sekcion " Teko ". Se vi ankoraŭ ne estas abonanto, vi povas tuj aboni ĝin per reta abonilo. Laŭ la nova reguloj, homoj ĝis 35 jaroj daŭre estas TEJO-membroj. La " novaj junuloj " jam povas elŝuti *Kontakto*-n, sed kun nepra kondiĉo, ke en la datumbazo de UEA estu registrita ilia naskiĝdato. La elŝutado de *Kontakto* por 30-35-jaruloj estas funkciigita nur en la ĉefa retejo: uea.org/revuoj/

Novajoj

Mortaĉu sane !

S-ino Hilal Elver, speciala delegitino de UN pri nutraĵ-rajtoj asertas, ke ĉiam pli facile akireblas en la nuna mondo la rapidaj nutraĵoj (fast-food) , kaj tio kolizias kun la hom-rajtoj por pli konvena nutrado. Ŝi kritikas ankaŭ la liberigon de vendado, kio helpas por grandaj korporacioj aperigi en la merkato siajn malmultekostajn nutraĵojn, pro tio malriĉuloj havas dilemon: ĉu mono aŭ konvena nutrado. Ŝi postulas, ke ŝtatoj faru la leĝon por kontraŭi la nutrad-industrion, ke ĝi ne influu la nutradpolitikon.

Samtempe Eŭropa Parlamento alvokis por la deviga limigo de industrie produktataj lipidoj, kiuj laŭ opinio de europarlamentanoj kauzas la infarkton de miokardio, obezecon kaj Alzheimer-malsanon (Alchajmeron) .

Li (tiu stultulino) deziras malhelpi al malriĉuloj aĵetadi la malmultekostajn nutraĵojn kaj devigi ilin aĵetadi multekostajn nutraĵojn. Sed malriĉuloj ne havas la monon, do ili devus malsati. Tamen pli bone estas vivi malplibone ol mortaĉi pro la malsato.

Denove

La kontrauleghaj enmigrintoj, kiuj deziris veni el Libio tra la Sicilia Markolo al Italio, forĵetis en la maron dekelkristanojn devenintaj el Niĝerio kaj Ganao kaj kiuj rezulte dronis. Kiam pontono venis al Sicilio, la polico arestis la 15 kuzintojn montritaj de aliaj enmigrintoj, kiuj detale rakontis pri la okazintaĵo dum la pontonavigado.

La arestitoj okazis la enmigrintoj el la Ebur-Bordo, Malio kaj Senegalo. Inter la akuzitoj estis unu neplenaga, tamen chiuj esti akuzitaj, ke ili mortigis tiujn kristanojn. En la pasinta jaro la Europa Unio reduktis siajn sav-agadojn en la Mediteraneo, ĉar aperis la argumentoj, ke tio instigas pli grandan enmigradon. Tamen la lastaj informoj montras, ke movo ankau okazis senrezulta.

Iam la kristanojn oni ĵetadis antaŭ la leonojn. Hodiau oni ĵetis ilin en la maron.

Subvencio por bordelo

Laŭ " The Daily Express " , Europa Unio donis monon por renovigi la ĉeĥan bordelon. Europaj

oficistoj donis monon por la ĉeĥa noktoklubo en kiu junaj rusinoj prostituas sin. La klubo ĉe la urbo Cheb ricevis subvencion 40 mil da eŭroj por la renovigo de la domo. Tiam Mario Borghezio, la itala eŭrodeputito ekdemandis, ĉu Europa komisiono estas konscia, ke tio estas jam ekstremece uzita laeuropea mono. Mi diru, la tuta Europa Unio tio estas unu granda bordelo, do ni ne miru.

Barelo da polvo

Siria armeo minacis, ke pafsurterigos chiun turkian militaviadilon, kiu aperos en siria aer-spaco. Lastatempe turkia aer-armeo aviadilatakis la kurdan milicon en Sirio, apogatan de Usono. Registaro de Damasko en sia demarŝo nomis la aviadilatakon " okulfrapa agreso " .

Tio jam estas vera barelo da polvo.

Kiam ghi eksplodos?

La dometo

Aŭstria Ministerio de Enlandaj Aferoj planis detruiri la domon el la 17a jarcento en urbo Braunau en Supra Aŭstrio, en kiu naskiĝis Adolfo Hitlero, tamen tiu informo elvokis kontraŭon de multaj ekspertoj. Tiam oni decidis, ke okazos la arkitektura konkurso pri ĝia rekonstruo. Oni planas, ke la domo havos ofican funkcion aŭ tie estos ia sociala institucio, Par oni devas protekti la familian domon de Hitlero, ke ĝi ne estu la pilgrim- kaj memorloko por nov-nazioj.

Estas opinio pri aŭstroj, ke ili sukcese persvadis al la mondo, ke Hitlero estis germano kaj ke Aŭstrio estis la unua viktimo de nazia Germanio. Pro tio nun aŭstroj havas embarason kaj la plej volonte ili eksplodigus ĝin.

Oni mortigas vian frateton

La norvega ministerio pri sano decidis, ke virinoj kun la ĝemelgravedo, sendepende de sia civitaneco rajtas fari aborton de unu el la ĝemelaj fetoj, eĉ se ne estas la medicinista konsilo. Similan aborton povas fari virinoj kiuj ne loĝas en Norvegio. Kuracistoj ne aprobas la ministerian decidon kaj ili opinias, ke tia selektiva aborto estas danĝera por la dua infano en la sino de la patrino kaj povas rezulti la aborton. En Norvegio oni rajtas fari aborton ĝis la 12 semajno de la gravedo.

Ho, kie estas la tempo, kiam vikingo certe venĝus, se lia edzino abortigus lian idon.

Kondomoj en Parlamento

Germanaj parlamentanoj akceptis regulojn, kiuj malpermesas seksumi sen kondomoj kun prostituitinoj.

La posedantoj de bordeloj devos informi klientojn pri la novaj reguloj. Celo de la TanQoj estas protekto de prostituitinoj. Prostituado en Germanio estas laŭleĝa.

Pri la seksum-pozicioj oni ne parolis.



Saluton! La redakta laboro postulas multe da komunikado. Por ĉiu artikolo aperinta abundas la retmesaĝoj, kiujn ni devas interŝanĝi kun kunlaborantoj de nia revuo. Iam mi faros kalkulon kiom da retmesaĝoj konsistigas ĉiun eldonon de Kontakto. Kial mi mencias tion? Ĉar la ĉefa artikolo en la nuna numero pritraktas la temon " SenPerforta Komunikado " .

La aŭtoro, Guillaume Armide, jam de iom da tempo skribas pri sia emo kontribui al la revuo per tiu ĉi temo. Kompreneble nia komunikado okazis tute glate, sed ni devis trovi interkonsenton pri diversaj punktoj. La artikolo estas tre instrua kaj leginte ĝin vi jam havos multajn elementojn necesajn por esti adepto de la SenPerforta Komunikado. Mi kuraĝas diri ke ĝi estas praktike resuma manlibro pri la temo.

Kore
Rogener PAVINSKI
Redaktoro de *Kontakto*

- **Albanio en la esperantaj revuoj**

Revuo MONATO

- **Princa geedziĝo**

Antaŭ nelonge okazis en Tirano princa geedziĝo. Temis pri la nepo de la eksa albana reĝo Ahmet Zog la 1a, reginta de 1928 ĝis 1939, kiam la itala armeo de Mussolini okupis la landon. La reĝo Zog la 1a tiam fuĝis kune kun sia edzino Geraldina, de hungaraŭsona

deveno, nur kelkajn tagojn post la nasko de ilia filo Skender, unue al Grekio, poste al Egiptio, Hispanio, Britio kaj Sud-Afriko. Kvankam li partoprenis en la antifaŝisma rezistado enlande pere de la partio *Legaliteti*, la komunistoj malpermesis al li reveni en Albanion per speciala decido de la Kongreso de Permet en majo 1944.

Referendumo

Lia filo, Skender Zogu, revenis al Albanio nur en la jaro 1993. En la jaro 1997, post gravaj enlandaj tumultoj, okazis referendumo pri restarigo de la monarkio, kiu tamen malsukcesis. Tamen en marto 2002, 72 membroj de la albana parlamento invitis la reĝan familion reveni. Skender Zogu, lia edzino Suzana, la filo Leka kaj la patrino Geraldina akiris la rajton ekloĝi en la iama reĝa palaco centre de Tirano, esperante repreni ankaŭ aliajn familiajn posedaĵojn. Skender deklaris sin ekster la politiko. Post la morto de Suzana, de Geraldina kaj de Skender mem, la registaro enpostenigis la nepon de la eksa reĝo, Leka Zogu, diplomiĝintan en prestiĝaj lernejoj eksterlande, ĉe la ministerio pri eksteraj aferoj, tiel ekspluatante la rilatojn de la eksa reĝa familio kun pluraj reĝaj familioj tra la mondo.

70 reĝaj familioj



Antaŭ kelkaj jaroj la 30-jara Leka fianĉiĝis kun la albana aktorino Elia Zaharia. Ilia geedziĝo estis neoficiale subtenata de la registaro, kiu esperis tiel ricevi pli da prestiĝo inter aliaj monarkioj. La solenaĵo okazis la 8an de oktobro 2016 en la prezidanta palaco, kiu estis konstruita de italoj dum la 1940aj jaroj sur monteto sude de la ĉefurbo, meze de granda parko. Ĉeestis reprezentantoj de 70 reĝaj familioj, de Hispanio, Britio, Nederlando, Jordanio, Maroko kaj aliaj. La princo Leka daŭre servas en la ministerio pri eksteraj aferoj kaj lia edzino Elia ĵus reĝisoris grandan muzikfestivalon „La magia kanzono”, kiun organizas ĉiujare la privata TV-kanalo KLAN. *La solenaĵo okazis la 8an de oktobro en la prezidanta palaco.*

Bardhyl Selimi

- Pilgramdo de bektaŝioj

Ĉiujare, inter la 20a kaj 25a de aŭgusto, ĉirkaŭ 200 000 homoj pilgrimas al la monto Tomorr, Albanio. Tie, sur la alteco de 2400 m troviĝas la tekeo¹ de Kulmak. Oni diras, ke ĉirkaŭ 1400 jarojn antaŭe tie estis entombigita Abaz Aliu, islama eminentulo, la heroo de la Batalo de Kerbelao. Sed la sciencistoj diras, ke tiu monto estis konsiderata sankta almenaŭ 5000 jarojn antaŭ Kristo, ĉar supozeble tie estis la Templo de Dodono kaj eĉ la tombo de Zeŭso. La nomo Tomorr mem rilatas al la nomo Tomuro, per kiu oni konis la aŭgurantojn, la fatdivenulojn. Ĉar tiutempe keltoj kaj pelasgoj, antaŭintoj de iliroj kaj de la nunaj albanoj kunvivis, oni diras, ke tiu vorto proksimas al la angla *tomorrow*, do oni antaŭdiris la morgaŭon.



Protesto

Ne hazarde inter la pilgrimantoj estas ne nur islamanoj, sunaanoj je rito bektaŝia, kies monda centro estas en Tirano ekde antaŭ 100 jaroj, sed ankaŭ kristanoj, eĉ fremduloj, esperantaj solvi siajn sanecajn kaj personajn problemojn. La medioprotektantoj protestas, ĉar ĉi tiu granda homamaso, kiu restadas surmonte kelkajn tagojn, forbuĉas milojn da oferŝafidoj kaj forbruligas tro da ligno por ilin kuiri.

Bardhyl Selimi

Vojaĝoj

Landoj, homoj

- *Fotoj faritaj de sudkoreana karavano, 2016*



En Rusio- Siberio



Tra Rusio




Rusaj esperantistoj



Esperantistino rusa



En Rusio



En Rusio



Berlin am 10. November 1989, einen Tag nach dem Fall der Mauer.
 Berlin, November 10th, 1989, the day after the Fall of the Wall.
 Berlin le 10 novembre 1989, un jour après la Chute du Mur.
 Берлин, 10-ого ноября 1989 г., спустя один день после Падения Стены.


En Berlino kie iam ekzistis la fiŝama MURO




Ne forgesendaj memoraĵoj



Tra la stratoj de Berlino



En Berlino



Dañre en Berlino



Berlino

- Sudkoreanoj en Albanio kaj Kosovo aŭgusto 2017







- Albana popola orkestro en Kosovo



Ponto de Gorica, Albanio



Albanaj knabinoj antaŭ 100 jaroj




Urbocentro de Tirana dum la faŝista okupacio



Albana gardistaro antaŭ Dua Mondmilito



La familio de albana reĝo Zog la Unua, antaŭ la jaro 1939



Skautistoj de Tirana 1931



Virinoj portas akvon Albanio antaŭ 90 jaroj



Albanaj virinoj antaŭ 90 jaroj



Albana eksreĝo



Albanaj virinoj jaroj 1930



Albana virino 1905



Albanaj dancantoj, pentraĵo antaŭ 200 jaroj



Mehmet Ali Paşa, fondinto de la moderna Egiptio



La vilaĝo Plitkoviç en Lipjan Kosovo

- La urbo Salvador en Brazilo, la plej nigra urbo eskter Afriko. Fotoj senditaj de prof. Alexandre









- Moskvo



Esperatistoj el Moskvo

Humoraĵoj

Anekdotoj

- Sinjorino plendas
 - Sinjoro kuracisto! Mia edzo havas iun problemon. Dum seksumado li daŭre ĝemadas, spiradas strange kaj kelkfoje eĉ kriadas.
 - Sinjorino, tio estas tute normala afero!
 - Povas esti, sed mi ne povas dormi pro tio.
 -
-



- Greka tragikomedio

La nivelo de edukado en Grekio estas la plej malalta en la EU, malgraŭ la fakto ke por lernanto estas tri fojojn pli instruistoj ol en Finnlando, kie la edukad-nivelo estas plej alta.

Bruselo demandis Grekion ĉu eblas, ke vivas ĉ. 11. 000 personojn pli ol 100- jaraĝaj. Grekoj kontrolis, kaj rezultiĝis ke tiaj homoj estas 800 (okcent) . La ceteraj jam delonge ne vivas, sed la familio ne raportis la morton kaj kolektas pension.

En la kvartalo Ekali (antaŭurbo de Ateno) en impostaj deklaracioj oni malkaŝis 324 basenojn. Kiam la registaro anoncis ke ĝi kontrolos per la satelito kiu havas naĝejon, en vendejoj mankis la kamufllireton. Entute en Ekali estis 16. 974 basenojn.

Kvankam lago Copais estis sekigita en 1957 j (antaŭ 55 jaroj) , 30 oficialuloj en plentempa laborposteno ankoraŭ administras la tutan " agadon " . .

Unuaj rezultoj de interna kontrolo en la Ministerio de Financoj montris ke 234 oficistoj de ministerio ne prezentis impostan deklaracion por la antaŭa jaro. Kaj 20 direktoroj de impostaj oficoj estis maldungitaj, kiam evidentiĝis, ke en liaj regionoj, homoj amase ne pagas impostojn.

Senĉese laboras establita de la greka registaro agentejo por la promocio de Tesaloniko, kiel " eŭropa urbo de kulturo " en 1997 jaroj. . . .

Greka registaro pagas aldonan monon tiel nomatan " edziĝ-alдонаĵo " kiu mezuras 10% de salajro. Ricevas ĝin ambaŭ edziĝintojn, ĉiu en sia laborejo. Aldonaĵon rajtas preni ankaŭ vidvinoj, vidvoj kaj personoj divorciĝantaj.

La registaro pagas ankaŭ t. n. " komputilaldonaĵon " (15% de salajro) por personoj kiuj dum plimulto da labortempo sidas ĉe komputilo.

Greka registaro pagas ankaŭ aldonaĵon por kono de fremda lingvo (10% de salajro) . Ĝi estas por ĉiuj, kiuj konas almenaŭ unu fremdan lingvon (estas bezonata neniu atestilo nek konfirmilo!)

Ekzistas aldonaĵo al la filinoj de generaloj kaj koloneloj, se ĝis 30 jaroj de aĝo ne edziĝos. Tiam, la ŝtato rekonas ke ili povus esti mistraktitaj en infanaĝo, pro milita familio kaj pagas al ili po 2.000 eŭrojn monate. . .

Malgraŭ tio, ke Grekio havas la plej grandan administracion en Eŭropo - greka konstitucio malpermesas maldungi dungitan jam oficiston. Konstitucio garantias ĝismortan dungecon.

- Bone, malbone

1.

BONE: Via edzino gravediĝis.

MALBONE: Ŝi atendas trinaskitojn.

MALBONEGE: Vi estas malfekunda.

2.

BONE: Via edzino ne interparolas kun vi.

MALBONE: Ŝi volas divorci.

MALBONEGE: Ŝi estas advokato.

3.

BONE: Via filo maturiĝas.

MALBONE: Li ekflirtis kun 40-jaraĝa najbarino.

MALBONEGE: Vi ankaŭ.

4.

BONE: Via filo multe da tempo restadas en sia ĉambro.

MALBONE: En lia ĉambro vi trovis pornografiajn filmojn.

MALBONEGE: En kelkaj de la filmoj vi estas ĉefrolulo.

5.

BONE: Via edzo decidis: " Sufiĉas jam infanoj! "

MALBONE: Vi ne povas trovi kontraŭgravediĝajn pilolojn.

MALBONEGE: Ilin havas via filino.

6.

BONE: Via edzo scias multe pri la modo.

MALBONE: Vi malkaŝas, ke li sekrete surmetas viajn vestojn.

MALBONEGE: Li pli bone aspektas en ili ol vi.

7.

BONE: Vi klarigas por via filino kiumaniere faras " tion " abeletoj.

MALBONE: Ŝi senĉese interrompas vian rakonton...

MALBONEGE:... kaj korektas vin...

TRAGIKE: Ŝi scias pli multe ol vi.

8.

BONE: Via filo havas la unuan rendezvuon.

MALBONE: Kun viro...

MALBONEGE:... kiu estas via la plej bona amiko.

9.

BONE: Via filino tuj post altlernejo trovis laboron...

MALBONE:... kiel putino.

MALBONEGE: Viaj kolegoj estas ŝiaj klientoj.

TRAGIKE: Ŝi gajnas pli multe ol vi.

10.

BONE: Legante ĉi tiun tekston vi ridis.

MALBONE: Vi konas homojn kun similaj problemoj.

MALBONEGE: Vi estas unu el ili.

(ĉerpitaj de la revuo FRESO)

Anekdotoj

- Sensoj

- Sinjoro kuracisto, mi ne scias kio okazas al mi, sed mi kontinue furzas. Feliĉe oni ne povas rimarki tion,

ĉar ĝi nek odoron nek sonon havas.

Eĉ nun, dum ni paroladas, mi jam furzis minimume trifoje. Donu al mi iun medikamenton kontraŭ tio!

La kuracisto skribas recepton por la maljunulo, kaj li revenigas lin post tri tagoj.

La maljunulo alvenas post tri tagoj malkontente.

- Kion vi donis al mi? De kiam mi manĝas tiun medikamenton, ĝi ankaŭ plu ne havas sonon, sed ĝi estas tiom malbonodora, ke oni ne povas elteni ĝin!

- Nu, tiam via flarsenso jam estas en ordo.

Nun mi skribas ion por plibonigi vian aŭdkapablon.

- Anekdotoj el la revuo FRESO

Edzina pledo

Sinjorino plendas al amikino pri sia edzo:

- Li estas tia. Dum la tuta jaro li vojaĝadas, nur dum unu monato li estas hejme.
- Tio devas esti tre teda vivo por vi, ĉu ne?
- Nu ja, tiu monato tamen rapide pasas...

La Pastro

Sinjorino malsaniĝis kaj ne povas iri al la diservo en la dimanĉo. Tial ŝi sendas tien sian edzon.

Kiam li revenas, ŝi pridemandas lin:

- Nu, ĉu vi estis je la diservo?
- Jes, respondas la sinjoro.
- Ĉu estis bele?
- Jes.
- Ĉu la pastro predikis?
- Jes.
- Ĉu vere? Kaj pri kio?
- Pri pekado.
- Kaj kion li diris?
- Li kontraŭas.

Anonco en Gazeto

" Edziĝonta junulo serĉas kontakton kun sperta sinjoro, kiu konvinku lin ne fari tion. "

Mortonta viro

Diri la veron maljunulo sentas sin mortonta kaj vokas sian multe pli junan kaj viglan edzinon al si:

- Nun mi baldaŭ mortos... diru al mi sincere, ĉu miaj infanoj vere estas miaj...
- Sed... hezitas la edzino. Kaj se montriĝos, ke vi ne estas mortonta?

Spertulo

Turisto vizitis ekspozicion de pentraĵoj kaj parolis al sia amiko:

- Tiu ĉi pentraĵo estas vere realisma. Ĝi vekas mian apetiton.

La konulo tiel demandis:

- Kiel eblas, ke sunsubiro vekas vian apetiton?

La turisto respondis:

- Ĉu tio estas sunsubiro? Mi pensis, ke estis fritita ovo!

Sperta pentristo

En pentraĵa ekspozicio en Parizo, la vizitanto demandis la pentriston kiu staris apud li:

- Kion prezentas tiu ĉi bildo?

-Bovinojn sur paŝtejo.
-Ho jes! Sed paŝtejon tie mi ne vidas - respondis la vizitanto.
La pentristo tiel klarigis:
-Tiun la bovino jam formanĝis.
-Sed, majstro, tie mi ne vidas eĉ unu bovinon!
-Mi demandas vin - diris la pentristo - kial restu tie la bovoj, se tie jam ne estas herboj?

Hejma konflikto

La junaj geedzoj havis konflikton hejme kaj poste dum la aŭtoveturado ili ambaŭ obstine silentis. Preterpasante aron da azenoj, la edzo diris moke:
-Ĉu viaj parencoj?
La edzino:
- Jes, boparencoj.

En la lernejo

Instruisto, ĉu oni povas puni iun pro io, ke li ne faris?
- Ne, tute ne! Kial? demandas la instruisto.
- Mi ne faris la hejmtaskon...

Diri la Veron

Viro ekvidis belulinon kaj li diris:
- Kiel belega vi estas!
Kaj ŝi respondis:
- Dankon! Sed bedaurinde mi ne povas diri la samon al vi...
- Nu, faru kiel mi, ne diru la veron! ! !


Paradizo

Adamo rakontas:
- Ĉi nokte mi songis pri vi, Eva.
- Ho, ĉu vi faris?
- Ne, mi ne rajtis.

Matematiko


Bildaj ekzercoj de Shkurte Sulejmani

- Solvu



- Solvu

**80% e njerëzve
dështojnë në këtë test**



- Solvu


$$\text{😂} + \text{😂} = 28$$

$$\text{😬} \times \text{😬} = 36$$

$$\text{💃} + \text{💃} + \text{💃} = 15$$

$$\text{😬} + \text{😂} \times \text{💃} = ?$$


Sa katror janë ?




95% e kanë gabuar!

Atentu: 95 % de la homoj eraris

- Solvu



- Solvu



- Solvu se vi estas geniulo

Solve if you
are Genius !

$$8 = 56$$


$$7 = 42$$

$$6 = 30$$

$$5 = 20$$

$$3 = ?$$


- Solvu



Esperanto en bildoj


- Frazoj

KIAL MALVARMEGAS?



- Prepozicioj

Esperanto en bildoj



- La prepozicioj ilustrite per voĉo kaj per bildo

<https://www.youtube.com/watch?v=6HqP--vFfhg>

- Gramatiko



- gramatiko

Ĉu la 1-a aŭ la 2-a variantoj de la suba frazo estas - laŭ Via opinio - preferinda?

1. " En la Flavon-produktaĵoj ne troveblas artefarita substancplibonigaĵo, gustopliigaĵo aŭ konservaĵo. "
2. " En la Flavon-produktaĵoj ne troveblas artefarita substancplibonigilo, gustopliigilo aŭ konservilo. "

Beletraĵoj

- " Elmigrintoj: mi, vi, li... "

Historio de la homaro konsistas el migradoj kaj ... militoj. Homoj migris kaj migras pro diversaj kialoj. Pro scivolo, por serĉi pli bonajn vivkondiĉojn, por ŝteli de najbaroj pli fekundan teronon, virinojn, infanojn. Bedaŭrinde tio plej ofte kaŭzis kaj kaŭzas militojn. Oni povas konstati, ke ni ĉiuj estas migrintoj – enmigrintoj/elmigrintoj. Dum jarcentoj diversgrandaj grupoj da homoj translokiĝadis de loko al loko. Unue tio estis familioj, poste jam triboj, nacioj. Hodiaŭ ni pli malpli scias de kiu parto de la tero ni enmigris, sed tamen ne nepre ni scias nian naciecon. Dum la migrado sekvis interŝanĝo de genoj, de kulturoj eĉ de haŭtkoloro. Nuntempe jam oni povas

science esplori niajn pra-pra-praavojn de multaj generacioj antaŭ ni kaj tion ekscii. Tutcerte estus granda miro se okazus, ke miaj pra-x-avoj estis mongoloj. Do iasence ĉiuj ni estas en- aŭ elmigrintoj, sed tion oni ne povas konstati dum la vivo de unu generacio. Komence de la dudekunua jarcento la migrado alprenis amasan formon ĉefe pro militoj kaj ekonomio. Militoj, kiuj lasas post si ruinigitajn landojn, kaŭzas amasan murdadon de civiluloj kaj ĉiuj malfeliĉoj ligitaj kun tio. Kaj kiel ni reagis? Tre diverse. Komence eŭforio akcepti ĉiujn per malfermaj brakoj ĉesis. Ĉesis pro diversaj kialoj, ne nepre pro egoismo de la „riĉa nordo ". Plimultiĝis teroratakoj, plago de plej novaj tempoj. Tio kaŭzas timon kaj ofte akuzojn, ke ĝuste enmigrintoj kulpas pri tio. Sed ĉu ne ĝuste pro timo antaŭ tiaj atakoj fuĝas homoj el Sirio, Afriko? Tutcerte inter fuĝintoj/enmigrintoj povas veni ankaŭ teroristoj, sed plimulto de ili estas viktimoj. Viktimoj de militoj, viktimoj de maljustaj registaroj, viktimoj de mizero kaj viktimoj de teroristoj. Tiuj viktimoj ofte estas analfabetaj, precipe la virinoj. Do kian laboron ili povas fari? Por vere helpi al enmigrintoj plej bone estus certigi al ili loĝadon kaj laboron. Ofte lernadon – lernadon legi kaj skribi, precipe por infanoj, sed ne nur. Tio estas ne tuj plenumebla. Por tio oni bezonas tempon. Kaj monon. Pro la amasa veno de grandaj homgrupoj eĉ riĉaj landoj ne havas tiom da rimedoj por kontentigi atendojn de la venintoj. Ne la lasta obstaklo estas lingvo. Ĉu Esperanto povus plenumi ligan/kunligan rolon? Certe jes, sed ĝis nun ĝi ne estas tiom disvastigita. Esperantistoj estas migrada popolo, se tiel oni povas nomi homojn de diversaj nacioj, kulturoj, lingvoj, kiujn ligas nur komuna lingvo. Ni estas homoj edukitaj en diversaj landoj, en diversaj socioj. Tamen Esperanto portas kun si ankaŭ tiun „internan ideon ", foje-foje primokatan. Kaj ĝuste tiu ideo iasence ligas esperantistojn de la tuta mondo, eĉ se ili ne konscias pri tio. Ofte esperantistoj estas poliglotoj, eĉ se ne poliglotoj, ili scias du, tri fremdajn/mondfamajn lingvojn, tamen uzas Esperanton kaj volonte ĝin reklamas, instruas, kredante ĝian kunligan valoron. Se efektiviĝus la revo de Zamenhof kaj ĉiuj en la mondo uzus unu komunan lingvon krom la nacia, ne nepre Esperanton, tio povus esti alia planita lingvo, ĉu tio preventus militojn? Homan agresemon kaj avidon? Probable ne, sed almenaŭ eble helpus nun ekregi tiun amasan enmigradon. Atendoj de enmigrintoj estas diversaj – de postuloj ĝis humidaj petoj. Ne malofte enmigrado/elmigrado estas nur portempa kun forta deziro reveni en sian landon kaj tie loĝi kaj labori. Tian sintenon oni vidas ĉefe ĉe la kleraj, edukitaj enmigrintoj/elmigrintoj.

Tamen migras ne nur viktimoj de militoj, mizero, religiaj kaj aliaj persekutoj. Migras ankaŭ aliaj ne nepre por serĉi pli bonajn kondiĉojn, sed ankaŭ kiel volontuloj por helpi diversajn projektojn – mediprotektadon, instruon, kuracadon ktp. Ne malgranda estas grupo migranta – ĉu nur vojaĝanta? – pro scivolo, por ekkoni aliajn landojn, aliajn kulturojn. Ofte tia migrado/vojaĝado daŭras kelkajn jarojn. Foje-foje finiĝas per ekloĝado en alia lando, se ekestos tiaj kialoj. Ekzemple „internacia " geedziĝo. Nuntempe la miksado de rasoj, nacioj okazas pli ofte pro facileco kaj ofteco vojaĝi. Junaj homoj vojaĝas por studi en aliaj landoj ol la propra, aliaj iras labori en alian landon ol la propra, kiu ne havas por li/ŝi laboron aŭ simple por sperti vivon en alia lando, ekkoni aliajn homojn kaj iliajn kutimojn, religiojn kaj perfektigi sian fakon. Do ĉiu el ni povas esti elmigranto/enmigranto aŭ konstanta aŭ portempa, dissemante siajn genojn en diversaj mondanguloj. Foje-foje ni aŭdas esprimojn: vera germano, vera polo, vera franco ktp. Ĉu veras la esprimo? Kiu nacio povas diri pri si mem, ke ĝi estas homogena? Ĉu entute estas tia nacio? En Pollando la esprimo estas ofte uzata. Sed ni konsideru la geografian situon de nia lando. Dum jarcentoj trairis ĝin multfoje militaj trupoj el okcidento al oriento kaj inverse. El nordo al sudo kaj inverse. Dum la militoj okazas diversaj maljustaĵoj, perfortoj. Kiu povas diri kun centprocenta certeco, ke li/ŝi estas vera polo, ke lia pra-x-patr (in) o estis pol (in) o? Eĉ lasante flanken militojn, en mia lando loĝis ekzemple multaj judoj, eble ne tiom multaj sed

tamen loĝis ankaŭ diversnaciaj komercistoj aŭ metiistoj, volonte akceptataj pro ilia utileco al la lando. Ankaŭ multaj poloj pro diversaj kaŭzoj, ne malofte pro persekutoj fare de okupantaj la landon potencojn, elmigris el la lando. Multaj por ĉiam.

Do antaŭ ol ni diros ion malŝate, moke, malamike kontraŭ el- aŭ enmigrinto, ni pripensu, ĉu eble tiu estas nia malproksima kuzo? Ni montru pli da estimo por alikredantoj, alinacianoj, al homoj kun alia haŭtkoloro. Eble ni etendu manon al tiu aŭ alia nia kuz (in) o? Eble ni instruu al li/ŝi Esperanton?....

(Ĉefpremiita verko de Helena Burchardt en la literatura konkurso 2016 de Bjalistoka Esperanto-Societo kaj Podlaĥia Libraro sub amasinforma patronado de Gazeta Wyborcza.)

- VRCHLICKÝ, Jaroslav (1853-1912)



LA VIOLONO DE L' CIGANO.

Gaje sin hodiaŭ distras
la popol' en la kastelo,
kiam per Tokaja vino
ĝin regalas la nobelo.

Ĉe la son' de sakfajfilo
kaj ĉe ludo de cimbaloj
dancas oni, kantas oni
kaj babilas ĉe pokaloj.

Jen cigano! Ha bonvenon,
venas vi en ĝusta horo!
Ludu nur! La hundoj dormas,
skurĝon perdis la sinjoro.

La unua kord' eksonas
de l' cigana violono
ĉiu tono kvazaŭ flamo,
koron pikas ĉiu tono.

Ĝi kraketas kiel fajro,
ĝemas kvazaŭ en turmento
oni kredus, ke la kordo
devos krevi post momento!

Nun ĝi muĝas kiel vento,
kiun sekvas tondro brua;
el profundo ĝi sin svingas
supren al la kordo dua.

Furioze kaj senbride
ĝi aŭdiĝas en la halo,
kiel se tra stepo vasta
vir' galopus sur ĉevalo.

Tuj mallaŭte ĝi nur flustras
aĥ! rampado de vipuro! -
tuj ĝi blekas, kvazaŭ lupoj
luktus en sovaĝa kuro.

Ĉu vi aŭdis? Sibla ĝemo,
akrigado de tranĉilo!
Jen brueto, kvazaŭ flugus
korvoj ĉirkaŭ pendigilo.

La flugilojn ili skuas,
homan korpon disŝirante,
sed subite - kia ŝanĝo! -
dolĉe sonas ĝi kaj kante.

Jes, la tria kordo vibras
delikate, kun gracio,
almiksiĝas nur kelkfoje
fulma tono de pasio.

Kiel najtingal' ĝi ploras,
ŝaŭmas kiel ruĝa vino -
kiel se ciganon junan
ĉirkaŭbrakus ciganino.

Aŭdu nun: la melodio
tremas arde kaj sopire,
vana amo kaj ĵaluzo
montras sin en ĝi korŝire.

Jen tintado de pokaloj
kaj frivolaj diboĉ-krioj -
iu plendas malespere,
ŝiras harojn de l' tempioj.

Kaj la kvara kord' respondas
per sonoro de malĝojo -
ŝajnas, ke post ĉerko oni
marŝas sur tombeja vojo.

Ĝi ululas, kvazaŭ nokte
uragan' tra kampoj kurus,
zumas, kiel se kadavro
en la tombo ekmurmurus.

Akra frapo! - Ĉiuj kordoj
donas nun la lastan tonon.
Al la koro la cigano
premas sian vilonon.

Noktomezo. . . Dormas ĉiuj...

Sole la nobelo miras:

»Stranga kanto! Vi klarigu,
kion ĉiu kordo diras!«

La cigan' rigardon fiksas

al la servistar' ebria:

kiel violona eĥo

sonis mola voĉo lia:

»Via moŝt' apenaŭ kredos:

kordo havas ankaŭ koron

kaj fidele interpretas

la plezuron aŭ doloron.

Bonan havis mi patrinon,

estis tre de ŝi amata;

profetadis ŝi al homoj,

kiam estis ŝi malsata.

Foje ĝin nobelo kaptis

kaj rostigis ŝin vivanta.

Kia mir', ke kordo mia

ŝin nun estas priploranta!

Fraton havis mi - vagulon,
sed al li min amo ligis,
kaj ne scias mi, pro kio
oni fine lin pendigis.

Eble juste - tion ofte
nun mi mem al mi konfesas -
la malsaĝa kordo tamen
lin funebri jam ne ĉesas.

Ĉastan mi edzinon havis,
trafis ĝin mizera ŝanco;
duonnuda la nobelon
distri devis ŝi per danco.

Li per silko kaj per oro
volis poste ŝin kompensi. . .
Ho, sinjor', pli bone estas
nun pri tio ne plu pensi!«

Kun la kara violono
marŝas la cigan' al pordo...
»Haltu!« la nobelon vokas.

»Restas ja la kvara kordo!«

La cigano ekridetis,

haltis iom, paŝis plue.

»Volu kredi, via moŝto,

vi demandas superflue!«

Li foriris. . . La servistojn

vane vekas la nobelo -

antaŭ ol li vekis ilin,

ha! jam brulas la kastelo. . .

1885

(Tradukis Miloš Lukáš)

- **Julia
Sigmond**

2016 DECEMBRA LETERO

Nu, ĉi tiu letero ne estos tiel longa, kiel la novembra estis! Mi ripozis multe, danke al Filippo, kaj mi fartas bone. La 13-an de januaro mi iros denove al la hospitalo, por kontrolo kaj por tiel nomata "purigado" de la veziko – se tamen restis en ĝi iuj "bagatelaĵoj". La Kristnaskon dum mia tuta vivo mi kunfestis kun miaj gepatroj kaj gefratoj. Nun, la unuan fojon mi ne estos en Kluĵo, sed mia sano estas nun la plej grava afero, do, mi rezignis pri la vojaĝo. Mi ricevis belegan poemon de iu amikino. Fakte ĝi estas preĝo por maljunuloj, sed ĝin legante – laŭ mi – ankaŭ la gejunulojn ĝi povas pensigi! Ĝi tre plaĉas al mi, ĉar preskaŭ perfekte spegulas miajn

pensojn. Sendante ĉi poemon, mi deziras al vi ĉiuj: Feliĉan Kristnaskon, Pacoplenan Novjaron kaj tre-tre bonan sanon!!!

Julia

- **Sali Bashota - Kosova verkisto vaste tradukata**

(Sali Bashota: " Albán éjszaka " , " Napút " , Budapest, 2016)



Ĉi tagojn en Budapeŝto eldoniĝis de " Naput " la poezia volumo de Sali Bashota je titolo " Albán éjszaka " (" Net shqiptare "). La elektitaj poeziaĵoj el la beletra verkado de Sali Bashota estas tradukitaj en la hungara de Robert Luaro kaj Györi László.

La redaktoro de la eldono, la konata poeto hungara Györi László en sia enkonduko, interalie, li konstatas:

" Bedaŭrinde la hungara leganto havas malmulte da scioj pri la albana beletro. La sola ĉeesta verkisto kun kelkaj romanoj estas la verkisto Ismail Kadare, sed la albana poezio estas malproksima por ni. Je kelkaj esceptoj, pro malfacilaĵoj lingvaj, ankaŭ ĝin ni ne estas tradukinta en la hungara el la albana, sed el la franca aŭ angla. Ĉe ni estas malmultaj tiuj kiuj konas la albanan. Nia elstara albanologo István Schütz komprenis, eĉ skribis ankaŭ sciencajn verkojn pri la albana lingvo, sed li ne plu vivas nun " ...

Pluen, Györi László li substrekas: " Imagu kiom nekonata estas la Kosova beletro ĉe ni. Ĉi tie ni prezentos kelkajn partojn kun poezioj de albana poeto el Prishtina. Tio kio trafis Kosovon dum lastaj jardekoj estas trafinta ankaŭ la aŭtoron rektmaniere. Lian hejmon oni ruinigis, la manuskriptojn kaj la librojn oni estas forĵetinta kaj forbruliginta, fakto kiu en liaj versoj kelkaj fojoj perceptiĝas je kovrita maniero. Nature, samtiel, ankaŭ la pasinto de albanoj, iliaj suferiĵoj. Ni devas esti konsciaj ke pri la lingvo kaj albana popolo estas multaj kozo ne klarigitaj, koncerne la devenon de la popolo kaj albana lingvo, ilia lingvo estas indoeŭropa, sed ĝi konsistigas apartan insulon. Albanoj sin konsideras iliroj, sed supozeblas ankaŭ la deveno el trakoj. Ni substrekas tion, ĉar ankaŭ Bashota alportas en siaj versoj la antaŭenintojn.

Li ne estas laŭvica poeto, li estis ligita al la nuntempa monda beletro. Li vivas kun surpriziga fantazio, foje bizara, tiel ni legantoj devas solvi la mozaikon de la ideoj por ke liaj poezioj ricevu

plenan signifon. Pluen ne ni estas, sed pri tio parolas mem la enhavo de la poezioj " , substrekas László en sia postdiro por la eldono " Albán éjszaka " .

Sali Bashota estas aŭtoro de tridekkvin verkoj en poezio, poezia prozo, eseoj kaj beletraj studaĵoj, dum en la diversaj lingvoj de la mondo ĝis nun li eldonis la jenajn verkojn:

" Only Death is White " / " Vetëm vdekja është e bardhë - Nur la morto estas blanka " (en la angla) ; " Beauté maudite " / " Bukuri e nëmur- Malbenia beleco " kaj " Allume la lumière magique " / " Ndiz dritën magjike - Ŝaltu la magian lumon " (en la franca) ; " Schalte das magische Licht ein " / " Ndiz dritën magjike - Ŝaltu la magian lumon " (en la germana) ; " Il gioco delle foglie " / " Loja e gjetheve - La ludo de la folioj " (en la itala) ; " Exilul Sufletului " / " Ekzili i Shpirtit - La ekzilo de la spirito " kaj " Ploaia fara Tine " / " Shiu pa Ty - La pluvo sen vi " (en la rumana) ; " När himlen tystnar " / " Kur hesht qielli Kiam la ĉielo silentas " (en la sveda) ; " Прокълната красота " / " Bukuri e nëmur 0 Malbeniata beleco " (en la bulgara) : " Ako stanam angel " / " Nëse bëhem engjëll Se mi fariĝas anĝelo " (en la makedona) ; " Η άλλη όψη του " / " Pamja tjetër e botës - La alia aspekto de la mondo " (en la greka) .

" Albán éjszaka " / " Net shqiptare - Albanaj noktoj " estas la plej nova libro de Sali Bashota eldonita en la hungara.

La poezio de Sali Bashota estas reprezentita en multaj antologioj ene kaj ekster la lando, dume liaj verkoj estas promociitaj en Parizo, Sète, Buĥaresto, Sofio, Baselo, Malmö, ka, samkiel en la diversaj internaciaj poeziaj festivaloj.

Bashota estas honorigita per altaj beletraj premioj en Kosovo, Albanio, Makedonio, kiel jene: " Pjetër Bogdani " (1999) , " Pena e Artë - La arta Plumo " (1990 kaj 2000) , " Menada " (2004) , Çmimi i Mitingut të Poezisë në Gjakovë- La premio de la Poezia Kunveno en Gjakova, (2006 kaj 2012) , " Serembe " (2010) , Çmimi i Ministrisë së Kulturës - La Premio de la Ministerio de la Kulturo (2012) ka.

La ekzilo de la spirito

(Ekzili i shpirtit)

Kiel mi alnajligu Boa-n ĉar noktiĝis

La spiritan ĉasaĵon surmeti enmane

La korvo promenas sur la sekaj pupiloj

Du mil jarojn la libero alfrapiĝas muron

La ekzila vundo la pulmojn nigrigis
En la sankta tago kiam la versumado ploras
La eltombigan solenaĵon la songo forglutis
Kiam la sangumita litero la larmon sekigis

La mian tristecon trafas la mortotago
Kiomfoje mankaptas ĝi arde brogas
Forĵeti la ventron sed renversiĝas la mondo
Liberiĝas la animoj restintaj vivaj

Kiel mi alnajligu Boa-n ĉar noktiĝis
La spiritan ekzilon denove la aŭtuno flavigis
Ĝis krias la poeto la preĝaŭguro finiĝis
La turbano en la sino ĉu per kelkaj vicoj ruĝiĝis

La ama martiriĝo

(Martiria e dashurisĉ)

Migras la ardiĝiĝemulino plene je ĉarmeco

Vringas ŝi la amon sur la tombo

Anstataŭ la larmoj elgutas pluvo

La korpo de la martiro envolviĝas per fajro

La doloro luliĝas per la lulkantoj
Ekzila pejzaĝo ruĝa nigra
Diletas sep ulnojn profunde la koro
Kantas la Ardiĝemulino pro novedzineco

Kiam ŝi revivigas la fierecon
Mortodanco kiom forte doloras
Kiam malfermas la animon per fulmo

Ho veploras la Ardiĝemulino plene je enuo
Kelkiu tutan tiun magion faligas
Kiam ŝi la junan bravulon kuraĝigas.

Scenejo sen larmoj

(Skenjĉe pa lot)

Kuŝadis la vundo naŭ jarojn surlite

Por eligi la vorton el la medolo de laeterneco

Plej grandajn suferaĵojn postlasis en la ostaro

El nia fajro grateno de la infanaĝo

Fremda tranĉilo enfiksiĝas en la oston

Kvazaŭ nigran ĉemizon tondita duone

La lingvon de la pacienco renversigi

El la tera ombro al la stelara harmonio

Nigris la aŭroro gratene kaj cindre

Tra la vorta pado kiu sangon elgutas

Kiomfoje ni vekiĝas pro nigra inkubo

La sortajn kantojn kiu kuraĝigas

En la nova aŭroranta tago

Pratempa fulmo en soleco ne fulmas.

La dormo de la libero

(Gjumi i lirisè)

Mi demetas la versojn disde la sendormeco

Kiam la sango restas ruĝa lanĉapo

Malfermas ni la korpon-vundo pro enuo

Sed la pacienco ne envanas.

Lulas mi la vorton en la lulilo aŭ la tombo

Per krioj plene je arto kiu ne mortas

Al la kuraĝo mi frapas surkapen per fajro

Ĉu la doloro kovriĝas per rosfloro

Rompas mi la dormon de la libero

Bruego etendita en la sama bordo

Kiam ne aŭdiĝas la barbareca bruaĉo

Mia sentimento kie perdiĝis

Pro la vundo kiu ne fermas tiun padon

Kiom malbona vetero estas en la ĉefurbo.

Trista meditado

(Meditim i trishtë)

Ĉagrena versaĵo tiun homamason entombigas
Sur la placon de la venko denove spuron ĝi postlasas
Trista meditado vestite funebre
Fendetas la muron kiu apenaŭ enfalas
La poeto krias kiam oni sangumigas la ties poezion
Malhela mallumo kovras lin apenaŭ fleksiĝas la fiereco
La ribelo turniĝas en malbenan sagon
En kiu infero trafas nin la blindiĝo
Trista meditado vestite funebre
Kion mi faru kun la versoj falintaj en la barbareco
Mortinta vizaĝo sangan abion kovras
Viva memoro kiom da jarcentoj sklavigas nin
Mia tomboŝtono bezonas belan ombron
Kaj eltombiga kampano ĵus batis

La makulo

(Njolla)

La feliĉaj vortoj dormas en la salonoj
Eŭforeca stilo troviĝas ene de ies malfeliĉo
Sufokite en la epika dormo de la makulo
La klimato fermas la iluziojn de la eksa diktaturo
En la rustiĝinta Kesto de Pandoro

Pli poste venas la sklerozo de la lacigita sorto
Deklarita rutinaĵo en la mondo de la sopiro
Jam apokalipsa vizio okazinta
Kvazaŭ skalpelo brulruĝigita meze de la fajro

Sed bedaŭrinde
La konformema tago batas
La logikon de la paperoj
Diable, Dio mia

S (k) lavaro⁸

(S (k) llavëria)

Nun vi ja vidas

Terura kampo etendiĝis transe

En alia vojo novaj bizancanoj

Nigra tero supre

Dum mi viva estas

Delirajn vizaĝoj trafas la rabio

Dum ili kolektas la timon

Falinta en ĉagrena abismo

En unu flanko finiĝas

Najtingala ĥoro en la kaĝo

Kaj la praa pacienco sugestigas

La velkintan floron pro aflikto

En la alia flanko la vorta grateno

Kaj la patria vizaĝo super la ondoj

Nun vi ja vidas

Kiel falas la s (k) lavaro

⁸ Vortludo: slavo- sklavo, noto de la redaktinto

Ĝi malfariĝas pro nia malnova osto

La urbo Dardanio

Ĉu ĝi denove ruĝiĝas kiel dekreto de la timeto

La sango sur la vangoj de la aglino

Ĉu plu lumigas

La pulmoj buĉitas en embusko

Nun vi ja vidas

En ĉiuj flankoj de la frenezmondo

Malrapide rampas la ombro de s) k) lavaro

Kvazaŭ ruĝa serpento de la imperio

Nun vi vidas ĉion

Krom mian animon.

La antianimo

(Antishpirti)

Min mortigas la pensoj pri la arto
Ili kriegas ĝiskiam mi aperigas surpapere
Ĉiuj faltoj de la nigriĝinta vizaĝo
En la nebulo de la malfeliĉa tolo

Kiam la pacienco enfalas ĝisgenuoj
Trapikitajn okulojn ni alkroĉas sur palisojn
La malbonan ombron la glavo forte dishakis
La kreajn membroj denove la tero kovris
Sep korvoj sur la tombon de Aloidoj falis
Bizaran kriadon ili ne ĉesis
En la alia vojo mia sango estis
Sen herediĝo ĝi apenaŭ nodiĝis
Blankharigita naturo meze de la utopiaj vundoj
Ĉiam ŝiriĝas pro retoriko
Nigra punkto enfalas sur la mondon
Kiam mi envas serĉas pri Harpoj kaj glaso
Ligitaj al la neskribita malbeno
Komplotoj kaj kaptiloj entombigitaj
La nokto bone kovras per morto
Hakita arbo ne plu havu sorton

Neniu viva estaĵo dormas sen frenezaĵoj
Ne mi ŝiras la sorton kiel la nigra birdo
En la plej majuna orakolo
La verso strikas kun reĝoj
Alvenos la fino de la barbareco
Kiam ĝi mortfalos sur la teron de Ilirio
Kiel nia Boa nazhunde
Mia skribo nun fariĝas karbardaĵo
Ĝis kiam mi aperigu sur la mortigita papero
Ĉiuj faltoj de la unua vizaĝo
Kio estas ĉi ludo kun antiannimo
Du mil jaroj ni mem buĉas Kristonm
Kaj la lango sufokiĝas per sango timeme
La insektoj kovras la povran solecon.

La mito pri la danco en la tombo

(Miti rreth kërcimit në varr)

La virino kaj

La la sep ties nigraj infanoj

Kaj lupino

La tombo

La gumbotoj de la juna tombisto

Kaj kadavro

La virino sučas siajn benitaj mamojn

La ses infanoj dancas ĉirkaŭ la fajro

Kun la rabia lupino enmane

La sepa frapas al la tamburoj de teruro aŭ tombo

Kio estas ĉi tiu tombo fosita tie

Boa enfalas teren sur la sangajn rokojn

La ŝiritaj gumbotoj de la eksa naiva tombisto

Piedpremas la vivan kadavron laŭ detektiva ritualo

Viva karno en la ekspozicio

La antihomon metas en embuskon

Kiel mortas mia estado

(Si vdes qeniesimi im)

Larmŝnuroj, ŝlifita linio survizaĝe

Brustŝirmiloj ruĝpisaj ellasantaj veon

Dolora katalogo ŝiras la diinan imaĝon

Kiel mortas mia estado ne falante martiron

La malpermesita frukto manĝatas de mezkapablulo

La maljuna infano la ostojn per gravito premas

La Magelanaj Nuboj tiun nebulozon malfaras

Oni ne scias kiu la unua poste mortas

La atesitaj versoj tra la terglobo diletas

La junaj hakistoj konsistigas la saman ĥoron

La Anatemio perdas la paŝon de la Granda Salto

Kosma harmonio vestas blanke la horizonton

Kiel mortas mia estado ne falante martiron

Dolora katalogo ŝiras la diinan imagon

- [Alvin Ekmekciu Mielli](#)

Veturigante al aeroporto mi rememoris ke mi forgesis kunpreni la mordrelon kiun mi surmetas dumnokte por protekti la dentaron pro kunfrotado kaj la orelojn pro makzela premo. Ne sufiĉi ja tempo por reveni kaj kunpreni ĝin, kiel mi ktime faris antaŭe. Dum la flugado mi estis senesperigita al si mem ke ne rememoris pri tiaĵo grava. Pli bone mi forgesu la komputilon ol la mordrelon. La feridojn mi tiel pasigos suferante pro la oreloj.

Elirinte eksteren de la aeroporto en Italio mi rememoris ke mi estis forgesinta la komputilon sur la sidloko en aeroplano. Tiel la malbono povus estiĝi pli malbona. La lasis la familion kaj iris por peti ĉe la oficejo pri la trovitaj objektoj. Oni ne estis trovintaj! Devas esti kelkiu forpreninta ĝin, kiu pasis post mi. Mi revenis ĉe mia familio. Sed ĝi ne atendis min. Ili estis irinta ĉe la aŭtilo de mia patro. Mi serĉi ilin ien ajn. Posis duonhoro, ankaŭ horo. Ĉu okazis io al la infanoj? La malbono fariĝas pli malbona ol la malbono estiĝinta pli malbone.

Tion mi pensis hieraŭ leviĝinte kun la aeroplano super Bergamo, kiam okazis turbulecoj dum kvaronhoro kaj la aviadilo ankoraŭ ne stabiliĝis. Mia edzino kriis al mi kial mi lasis la infanojn nur kelkaj vicojn antaŭe. Se okazus malfeliĉo al aviadilo mi ne povus savi ilin nek min mem. Estas ĉiam pli malbone..

- **Adil Olluri**




La reveno de la patro

Kiom malpeza vi fariĝis, patro! Neniam mi pensis ke iamfoje mi portus vin per nur unu mia brako kaj mia mano. Sur ĉi tiu sako korvokolora pendas blanka papero, kie oni estas notinta kelkajn numerojn al vi apartenantaj, la solajn kozojn kiuj nun distingas vin disde la aliaj, kiuj bonŝancis reveni tiel facile en la patrio, kiu ilin nun apenaŭ interesas plu.

Parolu, do, patro! Diru min almenaŭ unu vorton! Eligu voĉon kaj rakontu min kial interesis vin la patrio, pro kiu vi fariĝis tiom malpeza kaj senkarna?! Ĉu ne sufiĉis do ni?! Ne sufiĉis la patrino, kiu zorgis pri vi, samkiel la monaĥino staras antaŭ sankta templo, kiu obeis vin kiel kvazaŭ plej dediĉema kredantino al profeto kaj humiliĝis, kvazaŭ la plej humilkapulina sklavino al spirita gvidanto?! Ĉu ne sufiĉis mi, kiu sekvis vian modelon en ĉion, kion mi faris, en ĉiu vorto kion mi parolis?! Ĉu ne sufiĉis la urbo malferminta la pordojn por vi, kies stratoj kisis la paŝojn en ĉiu benita mateno kaj ĉiu mornbrova krepusko dum vesperoj?! Ĉu ne estis ni por vi la patrio aŭ ĝi

troviĝis ie sur la supraj nevideblaj etaĝoj de la ĉielo, kiujn mi apenaŭ povis kaj ne povas plu vidi?!



Eksa usona ambasadoro William Walker en Kosovo

Dum mi portas vin surŝultre, mi pensas pri la tempoj kiam mi estis ne pli ol du jara kaj vi portis min surbrake kaj promeniĝis min tra la urbaj parkoj aŭ tra verdaj kampoj de via naskiĝvilaĝo aŭ ĉirkaŭ la hejma korto de la avo. Vi viŝis miajn lipojn kaj vangojn kiomfoje mi malpuriĝis pro la dolĉaĵoj kiujn vi aĉetis por mi kontinue, ankaŭ tiam kiam mi ne volis.

Sekvis vi min kiomfoje mi sukcesis eskapi de via mano. Ho, kiom plaĉis min kiam mi vidis vin postkurante min. Mi gajiĝis, ridegis, kiam vi ne sukcesis atingi min, eĉ kiam vi estis tiel proksime al mi kiel sufiĉis nur etendi la manon por kapti min. Mi gajece ĝuadis miajn venkojn, kiujn fiere mi sciigis al la patrino kaj al la avo, kiuj amis min tiel kiel vi. Mi rememoras ke tuj post jaro, min ne plu plaĉis tiuj postsekvoj, ĉar mi eksentis ke vi povus kapti min imediate, sed vi intence ne atingis min, nur por igi min ekridegi. Plaĉis al mi kiam vi portis min surbrake ien ajn ni iradis, krom la vojon kondukanta al la kuracisto, aparte al tiu grandokululo, kies aspekto fariĝis por mi kvazaŭ noktomonstro. Mi malamis ne nur lin, sed ĉiun kuraciston. Mi neniel povus toleri tiun medikamentan aromon kiu estis en tiuj lokoj, Ne povis mi toleri tiujn senanimaj punkciilojn, kiuj tiel malvarmsange borus mian korpon. Fariĝis por mi koŝmaro tiuj diablaj punkciiloj, kiuj buĉis min ĉiutage.

La patrino rakontis min ke dufoje vi imagis min mortinta en tiu malvasta kaŝangulo de la kliniko, kio por mi transformiĝis en korpobuĉa kaŝangulo, kiun mi ne volis vidi alokule, sed vi kontinue veniĝis tien, ĉar vi malŝatis ke min okupu eĉ malsanulero.

Plaĉis min tiuj momentetoj, kiam mi fariĝis kvar jara kaj vi veniĝis min al la kafejo kun viaj amikoj. Vi instigis min eldiri mian nomon kaj ili demandis kies patro mi estis, kaj mi fiere menciis vian nomon. Mi rediris la vortojn dentopordente kiam ili diris ke vi ne estis tia kiam mi pensis pri vi. Kiom multe ili ekridis kiam mi aldiris ke tiaj estis ja ili mem, ke ilia nazo estis malrekta, ilia abdomeno estis pli granda ol la avo korbego en la vilaĝo, ke iliaj filoj ankoraŭ elpisis surlite, dum mi iris mem al la necesejo. Kiom da beleco kaj feliĉeco vekis ĉe mi kun vi tiujn tagojn, kiuj apenaŭ povas facile forgesiĝi.

Ĉio rompiĝis iutage kiam, reveninte pli frue ol kutime hejme, vi diris al la patrino ke vi ne plu irus al la laborejo, ne pro malŝato, sed ĉar oni ne plu permesis lin tie. Vi diris ŝin ke vi ekirus, sekvontan semajnon, en foran landon, kie neniu dirus vin ne plu labori. Mi ne vidis vin ekirante, ĉar vi estis survojiĝinta malfruajn noktajn horojn kaj vi ne volis rompi mian dormon. La patrino ne memoris, ĉu vi estas kisinta min surfrunte aŭ ne, ĉar via aŭtista amiko ne povis atendi longe, sed ŝi ja rememoris ke vi estis enirinta en la ĉambro kaj estas kovrinta min, dorsomalkovritan,

per la oranĝkolora kaj dika lankovrilo kaj estas petinta ŝin, ke ŝi gardu min kvankam estis nokto de frua septembro.

Ni ricevadis ofte viajn leterojn kun via kaligrafio, kiun mi klopodis kopii longajn semajnojn. Mi estis obscenita skribi ĉiun literon kiel vi. Venadis la ilustritaj bildkartoj, ardkoloraj, kiujn mi konservis apud la dikkovrilaj kajeroj, senditaj de vi kaj distingitaj disde tiuj aĉetataj en nia urbo. Mi orgojladis per ili antaŭ miaj samklasanoj de la dua grado. Venadis ankaŭ via voĉo tra la onkla telefono, kun duonviŝitaj numeroj, kiun li tenis ĉe la koridora muro de sia loĝejo, duoble pli granda ol la nia. Venadis ĉio de vi, sed vi mem neniam venis, patro.

Pasis jam ok jaroj senfrapante vi al la pordo de la nia loĝejo. Mi fariĝis dekkvarjarulo, kaj vi ne vidis min kreskante. Oni diris nin ke vi estis reveninta en nia lando kaj restis en profunda montara vilaĝo, ĉar vi ne kuraĝis eniri en la urbon. Oni diris ke vi estis decidinta alporti nin la liberon kaj senigi nin je timo pro la uniformuloj kiuj ne parolis al ni. Volis vi venĝi kontraŭ ilin, kiuj ne parolis al ni, venĝi kontraŭ tiujn kiuj ne lasis vin labori, kiuj persekvis vin kaj forigis vin disde ni. La patrino ne povis kredi, ke vi tiel kvieta kaj mildkoreca, povus kapti armilon kaj aldirekti ĝin al iu alia, dum mi ĉiutage turmentis min, kompilante planojn en mia menso kiel veni en tiu fora vilaĝo por vin vidi kune kun ĉiuj liberoportantoj.

La milito finiĝis. Mi kaj la patrino survojiĝis foriri, por pli facile saviĝi. La libero alvenis, sed vi apenaŭ videbliĝis ie. Ni atendis vin ĉirkaŭ du monatojn post la milito por ke vi ekaperu en nia loĝejo kaj ni ekĝoju pro ĉi tiuj venkaj tagoj, sed vi ne donis iun vivsignon, ne donis iun ateston, ĝis kiam ni eksciis ke vi estis militkaptita kaj oni ne sciis en kiu prizono kaj loko oni estis forsendinta vin.

Ĉiun nokton mi vidis vin en la sonĝo pendita kapturte sur la plafono de malluma ĉambro, katenita manpiede per malligebla ŝnuro, tenita de malnova trabo samkiel tri malbelaj, sovaĝmienaj policistoj, frapantaj vin senkompatate. Kiomfoje vi anhelis dolore pro iliaj fortaj frapoj, ĉi tiuj enfalis en ekstazon pro plezuro, laŭtvoĉe ridante ĝis la ĉiela firmamento. Ili ĝojis pro venko, ĉar estis sklavinta iun kuraĝinta redoni ilin la kuglon. Por igi pli kontentiga sian amuziĝon ili tute senvestigis vin kaj alfrapis pli arogante, per sia tuta forto. Via korpo estis sangumita kaj viaj lipoj demandis nur akvon, sed la senkompatuloj neniel zorgis pri tio, ili pensis ke via soifon povus estingi nur la sangoguto kiu elfluis de via frunto kaj de viaj ŝiritaj brovoj. Elgutis via korpo en tiu malluma ĉambro, kovrante la ties nigran koloron per makuloj de la ruĝo. Tiuj noktoj por mi estis plenplenaj per koŝmaroj, kaj, se ne estis la patrino, ankaŭ mi irus al la monto.

Mi kaj la patrino serĉadis vin longajn jarojn. Ni ne lasis homon sen demandoj, ne lasis spurojn ne sekvante. Ni volis scii en kiu loko oni estis pereiginta vin. Kvankam pasis jardeko da libero, por kiu vi oferiĝis, ni ankoraŭ esperis ke iutage vi revenus viva, ke iutage tute neatendite vi puŝus la tintilan butonon de nia loĝejo, aŭ senbrue enirus en ĝin, dum malfruaj horoj, samkiel vi faris por eliri de tie, por ke ne revenu iam ajn. Ni esperis kaj nur esperis, ĝiskiam iutage ni ricevis novaĵon ke via korpo estis jam trovita, kies ostoj mi portas nun subaksele, envolvitaj en ĉi tiu nigra sako.

Enesperantigis Bardhyl Selimi